



1984 februaro
77a jaro
n-ro 938 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Dinamismo de landa agado en Francio

Vi trovos,

ke dum la lasta monato tio ĉi estas la tria revunumero, kiun vi ricevas. Tiel nia revuo fariĝas – kiel iu bele ŝercis ĉi tie en la redakto – la plej ofta movada periodaĵo dum februaro! Tamen, eĉ se vi ĝuis tiun kuriozan fakton, ni faros nian eblon ne plu regali vin per tia "luksaĵo" en la estonto. Cetere, vi rimarkos iom da strangaj emfazoj en ĉi tiu numero: subite, ni enfokusigas la agadon en du eŭropaj landoj (Francio kaj Svedio), kaj provas atentigi vin, ke la antikveco de la diversaj landaj asocioj ne malhelpas ilin agi moderne kaj sukcese. Kio pri vi kaj via landa asocio (aŭ loka klubo), se vi hazarde loĝas en tiu plej "malnova" kontinento? Sed, kiel vi konstatos sur la paĝo 26, ni ja ne forgesis nian preferatan temon – Afrikon, des pli ke novaj kluboj kaj asocioj aperas tie, kvazaŭ fungoj postpluve. Kompreneble, ankaŭ vi mem povus helpi, ke la afrika rikolto daŭru kaj abundu. Ĝis marta marto!

Enhavo

- 21 Landa agado: Parizo liveras modelojn por sukcesa agado (G. Sutton/J.P. Danvy/I. Schoultz)
- 23 Informado: Novstila publika elpaŝo en Svedio
- 24 Landa agado: Kataluna kongreso
- 25 Nekrologo: Mortis tri akademianoj
- 26 Afriko: Esperanto-asocio ankaŭ en Benino (Hans Bakker)
- 27 Lingvo-problemo: Kiom da lingvoj troviĝas en la mondo?
- 28 Faka agado: Ĉu parolanta vortaro eblas? (Raymond Gonin)
- 29 Reagoj: Plian fojon pri *Koreo/koreano*
- 30 Antaŭ la 40a TEJO-Kongreso: La eternaj angloj (Reto Rossetti)
- 32 Recenzoj: *Il castigliano come base e mezzo di pianificazione interlinguistica* de Valerio Ari (D.B. Gregor); *Krestomatio de Esperanta literaturo* de I. Szardahelyi (G. Berveling); *Sociekonomiaj problemoj de ekologio* de Ĥristo Marinov (P.V. Ranganayakulu); *La turo de l' popoloj* de Han Ryner (K. Schubert); *Printempa danco* de Mario F. Bezzina/Carmel Mallia (Kris Long)
- 35 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 36 Loke — Fake (mallongaj novaĵoj)
- 37 Nekrologoj
- 39 La membraro de UEA en 1983 (membrostatistiko)
- 40 Esperanto en radio (kompleta tabelo)

La kovrilo

Oni povas aktivi en la Movado plurajn jardekojn kaj tute intimi kun liaj verkoj, sed renkonti profesoron Pierre Janton (maldekstre supre sur la kovrilo) – tio apartenas al raraj luksaĵoj. Ĉar sur la koncerna foto estis du vizaĝoj, ni devis telefoni al la prezidanto de la franca landa asocio kaj demandi, ĉu Janton havas blankan barbon. Nur kiam tiu prezidanto malgrimpis ĝardenan arbon (ĉar estis dimanĉo, kaj en Francio printempo proksimiĝas), ni povis identigi Janton. Espereble, la Papo ne legas ĉi tiun rubrikon kaj ne ekskomunikos pro dimanĉa laboro la koncernan prezidanton, kiu evidente antaŭrezignis la Paradizon! Sur la kovrilo aperas ankaŭ scenoj el la teatraĵoj *Babelo hodiaŭ* (supre dekstre) kaj *La ŝtona gasto*, plus la kovrila paĝo de la revolucie bela informilo de UFE. Pliajn detalojn serĉu sur la sekvantaj du paĝoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tōkyō, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Parizo liveras modelojn por sukcesa agado

Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) estas senkonkurence la plej aĝa landa movada organizaĵo, ĉar fondita en 1898. Dum pluraj lastaj jaroj oni povas konstati, ke tiu "antikveco" de UFE ne malhelpas ĝin esti inter la plej aktivaj landaj asocioj kaj inter tiuj, kiuj en sia laboro aplikas novajn, modernajn metodojn. Jen tri raportoj, kiuj bildigas tion kaj kiuj povas liveri iom da ideoj ankaŭ al aliaj landaj Esperanto-movadoj.

La 25an de novembro pasintjare okazis en unu el la universitatoj de Parizo (Paris VIII-Vincennes) Studtago pri Esperanto. La aranĝon aŭspiciis la Esperanto-sekcioj de kvar francaj universitatoj, Provence, Clermont-Ferrand, Haute Bretagne kaj Lille, kaj la gastiganta universitato. La temo, kiuj traktis la studtago, estis "La fenomeno Esperantovidita de neesperantistoj".

Oni malfermis la Studtagon, antaŭ ĉirkaŭ 150 personoj, per debato pri la temo. Debatis Louis-Jean Calvet, fakulo pri lingvistiko en pariza universitato, Jean-Claude Michea, agregacia profesoro pri filozofio, kaj reprezentanto de Jean-Pierre Van Deth, ĝenerala sekretario de Centro pri Informado kaj Esploroj por la Instruado kaj Uzado de Lingvoj (CIREEEL).

Post la debato sekvis dek altnivelaj prelegoj: "Esperanto en historia kaj socilingvistika kadro" de

Foto: J.M. Hoine



D-rino Barbara Despiney, estrarano de UEA, estis unu el la prelegantoj en la pariza Studtago.

Michel Duc Goninaz, "Lingvistika aliro al Esperanto" de François Lo Jacomo, "Psikologia rezistemo al planlingvoj, speciale al Esperanto" de Pierre Janton, "Esperanto – simpla komunikilo interpersona" de Barbara Despiney, "Amas-informiloj en la Esperanto-parolanta komunumo" de Jacques Le Puil, "Artismaj aspektoj de la lingvo Esperanto" de Georges Lagrange, "En- kaj eksterlerneja instruado de Esperanto" de Renée Triolle, "Universitata instruado de Esperanto tra la mondo" de Germain Pirlot (Belgio), "La Esperanto-literaturo kaj ties kulturaj radikoj" de Humphrey Tonkin (Usono) kaj "Propeŭtika valoro de la Internacia Lingvo" de Helmar Frank (FR Germanio).

La organizintoj konscias, ke ĝuste informi universitatanojn povas ludi ŝlosilan rolon por la estonteco de Esperanto. Universitatoj estas plej altnivelaj periloj de scio al la socio. Tial, se oni serioze traktas Esperanton en tiuj altlernejoj, ili peros sian sintenon al almenaŭ parto de la ĝenerala publiko.

Oni raportis, ke tamen ankoraŭ neniu pariza universitato proponas oficialan kurson de Esperanto, kvankam – kiel Germain Pirlot konstatis en sia prelego (vidu raporton en *Esperanto*, decembro 1983, p.203) – okazis dum la pasintaj jaroj tre granda progreso tra la mondo sur la kampo de universitata instruado de la Internacia Lingvo.

G.S.

Okazinta la 26an kaj 27an de novembro 1983, la unua Esperanta kanzona kaj teatra festivalo de Parizo, organizita de Unuiĝo Franca por Esperanto, atingis ampleksan sukceson kaj esperigan partoprenantaron. La meznombro de la spektantaro estis nete super cent, kaj verŝajne pli ol 400 malsamaj personoj ĉeestis.

Oni plej frekventis la kanzonprezentojn: kun Jo Bergeon, Guido Brandenburg, Feri Floro, Kiŝtle, Ĵak Le Puil, Ĝanfranko Molle kaj Serge Sire, sed ankaŭ la teatro kaj kabaredo prezentis kelkajn siajn adeptojn. Pro la proveco de tiu ĉi unua aranĝo, ĝin partoprenis nur francaj trupoj, sed kaj Tespa kaj Krizalido rivalis per originaleco. Tespa, post prezento de du mallongaj unuaktaĵoj (*La juda edzino* de Bertolt Brecht kaj *La advokato* de Jacques Cossin) okazigis la premieron de teatraĵo originale verkita en Esperanto: *La ŝtona gasto* de Michel Duc Goninaz (laŭ Puŝkin). La internacia mito pri Donjuano indis je rekreado Esperanta. La rigardantoj alte taksis ĝin per abunda aplaŭdado. Krizalido, krom per la prezento de *La evento* de Guy Foissy, regalis per originala iniciato – sub la patroneco de UFE, kaj lastmomente aldonita al la programo: teatraĵo franclingva pri Esperanto *Babel aujourd'hui* (Babelo hodiaŭ). Franclingva



Parizo ĉiam estis la ĉefurbo de la Esperanta kabareda arto: La spektantoj ĝuis la festivalan prezenton de la kabaredo "La Ruza Kruĉo".

ĉeestantaro povas de nun ekscii pri nia lingvo per plia metodo informa. Mi trovis la teatraĵon prezentinda.

La kabaredo aldonis iom da salo al tiu sesera kultura nutraĵo.

La celø prezenti tiajn verkojn en alia kadro ol en Universala Kongreso aŭ alia kongreso sukcesis. La partopreno de ĉirkaŭ dek nefrancoj permesas esperi pri ripeto ĉiujara de tia aranĝo. **Jean Pierre Denys**

Jean-Pierre Danvy

UFE eldonis imponan informan broŝuron: *L'espéranto: un droit à la communication* (Esperanto: rajto je komunikado). Riĉe ilustritaj paĝoj, bele aranĝitaj, vekas scivolon. La argumentoj estas konvinkaj kaj impresas serioze. La maniero prezenti la hodiaŭajn uzon kaj utilecon de Esperanto estas pozitiva kaj pensiga.

Eble la eleganta aspekto de la broŝuro estas ĝia plej grava kvalito. La ekstera formo de informilo apogas aŭ subfosas ĉiaspecan argumentadon. Amatereco kaj malzorga teknika prezento konvinkas la leganton, ke temas pri malserioza afero. Apenaŭ eblas kompensi tian malfavoran impreson eĉ per la plej forta teksto. Ĉion ĉi bone komprenis la prizorgantoj de la informado ĉe UFE – kaj la broŝuro estas tre zorge farita, en maniero taŭga por prezenti mondvastan movadon. Plurkolora preso, multaj kaj ofte grandaj

fotoj, atentokaptaj titoloj kaj vastaj blankaj areoj
invitas al legado kaj faciligas ĝin.

La leganto certe bezonas tian helpon, ĉar la teksto estas tre longa. Ĝi komenciĝas per pluraj paĝoj pri la bezonoj komuniki, pri la monda lingvoproblemo, pri avantaĝoj de Esperanto. La leganto tamen devas havi idealisman (optimisman) sintenon al la mondo, por senti, ke ĉio ĉi koncernas ŝin aŭ lin.

Spite la longecon, la teksto estas facile legebla, kaj ĝi havas ian logan etoson, kiu stimulas al plulegado kaj laŭgrada engaĝiĝo. Jes, la etoso estas loga, sed ne ĉiam vigla. Kiam oni fine atingas la informojn pri la hodiaŭa uzado de Esperanto, ili prezentiĝas en iom tro serioza, analiza maniero. La teksto ne sukcesas speguli la spontanecon kaj vigecon de la simpla homa komunikado per Esperanto. Feliĉe, la fotoj iom kompensas tion.

Enestas kelkaj ekzemploj de bone pripensita, stimula argumentado, kiu instigas halti kaj pripesi la faktojn. Jen: "Oni taksas, ke almenaŭ 10 000 verkoj tradukiĝis en Esperanton. Kvankam de varia kvalito, ili formas la plej vastan antologion de la monda kulturo, iam ajn entreprenitan por la uzo de la amasoj." Aŭ: "Por kiu estas ĉiutagaĵo legi albanajn biografiojn, armenajn fabelojn, svedajn romanojn, sileziajn kantojn, ĉerkesan antologion, ĉinajn rakontojn,

israelajn satirojn, estonan literaturon, hindajn dramojn, brazilajn poemojn, la nuntempan japanan literaturon, por ne paroli pri antologioj: kataluna, kelta, romanĉa, portugala...? Por la uzantoj de Esperantaj bibliotekoj.”

Aperas erara informo, kiun oni ofte vidas en propagandaj tekstoj: la Jarlibro de UEA ne enhavas ”pli ol 3 000 adresojn”; la delegita reto pasintjare konsistis el 2 183 personoj (kaj tiom da adresoj), kiuj okupis 3 618 delegitajn postenojn.

Resume, la teksto de la broŝuro verŝajne estas tro abstrakta kaj teoria por multaj legantoj, sed la argu-

mentoj prezentigas alloge kaj tre konvinke. La broŝuro donas la ĝustan impreson pri la tutmondeco kaj forto de la Esperanto-movado. Sed, ankaŭ la aŭtoroj de la broŝuro – Pierre Janton, Claude Piron, Jean-Louis Texier, Renée Triolle – certe konsciis, ke ne eblas en unu prezento kontentigi ĉies postulojn. Spite la ĉi-suprajn rimarkojn, tiu ĉi bela eldonaĵo de UFE certe apartenas al la plej bonaj informaj materialoj pri Esperanto, iam aperintaj. Se ni uzos ĝin kiel modelon por nia informa agado, la kvalito de nia laboro atentinde altiĝos.

Ingvar Schoultz

INFORMADO

Novstila publika elpaŝo en Svedio

La 24an de oktobro pasintjare, la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj, aperis en la plej legata sveda ĵurnalo "Dagens Nyheter" (La novaĵoj de la tago) grandformata enkadra anonco. Ĝi titoliĝis "Unu lingvo por UN? Alvoko pri la lingva demando en Monda Komunikado Jaro 1983", kaj ĝin subskribis ne malpli ol 76 svedoj, internacie, lande kaj fake konataj. (Vidu la Alvokon en aparta kadro, akompane al ĉi tiu teksto.) Tio estis la unua publika elpaŝo en speciala informa kampanjo, entreprenata de Sveda Esperanto-Federacio (SEF). Sekvas artikolo de Roland Lindblom, estrarano de UEA, kiu detale rakontas kiel oni planis la elpaŝon kaj kio venis poste.

La teksto de nia Alvoko estis, laŭ mi, iom tro "paceca", sed la intereso por paco furoris same en Svedio kiel en aliaj landoj dum la lasta jaro. Ni volis utiligi tiun intereson, ligante ĝin al lingvaj demandoj.

Estis grave en la komenco, ke Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento, kaj kelkaj aliaj "pezaj" personecoj akceptis subskribi. Post tio ni komencis elekti inter tutlande kaj fake konataj per-

sonoj, por kovri kiel eble plej diversajn fakojn, grupojn kaj interesojn.

Se komenti la nomojn, mi volas mencii tiujn de la nuna ministro pri edukado kaj kulturo, Bengt Göransson, kaj de tri eksministroj pri edukado: Jan-Erik Wikström, Britt Mogård kaj Ingvar Carlsson. Tiu lasta estas la nuna vica ĉefministro kaj kvazaŭ la "futuologo" en la registaro.

La duan lokon sur la listo okupis Maj-Britt Theorin, parlamentanino kaj UN-delegito. Ŝia nomo estas internacie ligita al intereso por paco, kaj ŝi estas membro de Sveda Asocio por Paco kaj Arbitracio. La prezidanto de tiu organizaĵo, Tomas Magnusson, subskribis la Alvokon, same kiel Lars Ångström, unu el la ĉefparolantoj ĉe manifestacio de Sveda Asocio por UN kaj pacorganizaĵoj, kiu okazis ankaŭ la 24an de oktobro. Krome subskribis la prezidanto de la sveda sekcio de Amnestio Internacia, Bo Lindblom, universitata rektoro, docentoj, verkistoj, komunumestroj, estroj de ŝtataj burooj, prezidanto de grava sindikato, aktoroj, episkopo kaj aliaj.

La tuja efiko de la Alvoko estis, ke kelkaj ĵurnalistoj telefonis al subskribintoj, precipe Ingemund Bengtsson, kaj aperis artikoloj. Redakcio ĉe la tutlanda radio faris programeron, en kiu ĝi intervjuis profesoron, kiu iam, antaŭ multaj jaroj, vidis lernolibron de Esperanto. El tio la redakcio konkludis, ke la subskribintoj verŝajne ne sciis, kion ili subskribis. Post tio pluraj leteroj atingis la redakcion, kaj en la programo semajnon poste oni laŭtleĝis el la korektoj. Tiam la program-gvidanto ne plu aldonis stultajn rimarkojn. Kiam mi post la programo kontaktis la intervjuitan profesoron, li mem konfesis, ke li surpriziĝis, ke tiu redakcio ne vokis iun subskribinton aŭ svedan esperantiston.

Tre sukcesa artikolo aperis en la gazeto *Fönstret* (La fenestro), organo de la plej granda studorganizaĵo por plenkreskuloj (ABF). La artikolo aperis sur la lasta paĝo, do en la plej videbla loko. La legantoj konsistas ĉefe el studorganizantoj kaj kursgvidantoj. La intervjuito, lektorino pri nordĝermanaj lingvoj ĉe la Universitato de Gotenburgo, Åsa Sahlqvist, estas

Vi povas tre efike helpi la laboron de UEA per frua pago de via kotizo por la jaro 1984. Multaj niaj membroj ja bone komprenas tion kaj ili jam pagis fine de la pasinta jaro. Aliaj atendas nian apartan personan memorigon. Sed ankau tio ĉi estas aparta persona memorigo!

membro de SEF kaj partoprenis la Universalan Kongreson en Budapeŝto.

La 9an kaj 10an de januaro, la tutlanda radio denove elsendis sep-minutajn programerojn pri Esperanto sub la rubriko "Novaĵmateno". La redaktoro, A. von Schoultz, faris kelkajn intervjuojn ne nur en Svedio, sed ankaŭ en Nederlando kaj FR Germanio. Ŝi interalie ĉeestis la Internacian Seminarion de Germana Esperanto-Junularo.

Unu lingvo en UN?

Alvoko pri la lingva demando en Monda Komunika Jaro 1983

La bazo de komunikado – lingvo. Ĉiuj homoj portas pensojn, kiuj povas kontribui al paco. La paco fariĝos ebla, kiam ĉiuj tiuj pensoj kaj espero estus konataj kaj povos esti diskutataj de ĉiuj. La paco estus ebla, kiam ĉiuj povos interparoli kaj kompreni unu la alian.

La lingvo estas la plej grava komunikilo de la homo. Komuna lingvo rompus barojn kaj malfermus la tutan Teron por interparoloj. Por ke paco estu ebla, ni ĉiuj povu paroli unu saman lingvon. Tiu lingvo egaligu ĉiujn. Ĝi devas ne esti ies gepatra lingvo, sed ĉiu povu lerni ĝin apud la gepatra lingvo.

Ekzistas tia lingvo: Esperanto. Esperanto diskriminacias neniun. Esperanto donas samajn eblecojn de komunikado al ĉiuj.

Hodiaŭ ĉirkaŭ 3 000 lingvoj estas parolataj sur la Tero. Kelkaj el ili estas faritaj "internaciaj lingvoj" de la potencaj nacioj. Tio signifas, ke niaj kunhomoj en la Tria Mondo ankoraŭ estas alparolataj per la lingvoj de la antaŭaj koloniaj nacioj. Tio signifas ankaŭ, ke ĉe ĉiu tablo, kie okazas internaciaj intertraktoj, troviĝas superaj kaj malsuperaj partoprenantoj, laŭ la scipovo de la koncernaj lingvoj. Per interpretistoj ili povas fari paroladon, sed ne interparoli intime.

En nia plej granda forumo interpopola, Unuiĝintaj Nacioj, ses lingvoj estas distingitaj oficialaj. La plimulto el la delegitaroj estas en subula pozicio kontraŭ tiuj, kiuj havas oficialan lingvon kiel gepatran. Konsciante pri la diskriminacio kaj aliaj problemoj kiuj konstruas barierojn inter homoj kaj nacioj, UN proklamis la jaron 1983 Monda Komunika Jaro.

Esperanto jam estas parolata kaj skribata sur la tuta Tero, sed politikaj decidoj estas necesaj por fari ĝin oficiala mondlingvo – la dua lingvo por ĉiuj.

Ni instigas ĉiujn partopreni en la laboro por mondlingvo.

La 14an de januaro ĉiusabata familia programo en la televido traktis Esperanton i.a. per intervjuo kun Ingemund Bengtsson. La programgvidanto estis la aktoro Per Ragnar, ankaŭ li subskribinto de la Alvoko. Kelkajn tagojn antaŭ la programo, virino el la redakcio vokis min, por informi pri Esperanto por la bono de la programo. Tiel okazis, ke oni malfermis la elsendon per la vortoj "Bonvenon al la programo 'Bonan matenon, Svedio'" en Esperanto. Ingemund Bengtsson parolis interalie pri sia vizito al Ĉinio (vd. *Esperanto*, okt. 1983).

Pro la Alvoko kaj la eroj pri ĝi en la amaskomunikiloj, ni rimarkis, ke la scivolemo pri Esperanto kreskis. SEF ricevis leterojn de homoj, kiuj iam antaŭe montris intereson pri la lingvo kaj kiuj nun revekiĝis, foje komencante agadon ene de aliaj organizaĵoj, kiel ekzemple Nordlanda Asocio. Plurloke rektoroj kaj instruistoj petis esperantiston prelegi pri la lingvo en iliaj lernejoj. Krome kluboj diversloke utiligis la Alvokon en sia informado. Tio denove generis plurajn artikolojn en ĵurnaloj. Ankaŭ montriĝis pli facile ricevi lokon por ekspozicio, kiam la respondeculoj vidis la nomojn sub la Alvoko.

La inform-ondo, kiun levis la Alvoko, ankoraŭ ruliĝas.

Roland Lindblom

LANDA AGADO

Kataluna kongreso

De la 29a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 1983 okazis en Sabadell, Hispanio, la 19a Kataluna Kongreso de Esperanto. Estas rimarkinde, ke la 18a Kataluna Kongreso de Esperanto okazis antaŭ intertempo de 47 jaroj, en 1936, tuj antaŭ la hispana enlanda milito.

La 19a Kataluna Kongreso de Esperanto ricevis patronecon de la aŭtonoma kataluna registaro, kies prezidanto estis en la Honora Komitato, kaj de la loka urbestro.

La solenan inaŭguron ĉeestis la ĝenerala direktoro de Kultura Disvastigado de la aŭtonoma registaro, s-ro Albert Manent kaj la loka urbestro.

Partoprenis la Kongreson ĉirkaŭ 200 homoj, inter kiuj estis 17 eksterlandanoj. Enkadre de la Kongreso okazis ankaŭ la 23aj Internaciaj Floraj Ludoj, tradicia belarta konkurso, kies ĉefpremion gajnis la itala poeto Nicolino Rossi.

Krom diversaj prelegoj kaj debatoj oni proponis al la publiko tri ekspoziciojn: "Esperanto en Katalunio", "La internacia komunikado" kaj "Esperanto kaj la paco".

La Kongreso aprobis tri rezoluciojn. La unua rezolucio celas la starigon de pedagogia komisiono,

por pretigi normigan projekton por la instruado de Esperanto en Katalunio, dum la dua pledas al Unuiĝintaj Nacioj tra UEA por mondpaco kaj malarmado. La tria rezolucio de la Kongreso petas, ke UEA agnosku la lingvan apartenon de siaj membroj, tiel en la kongresoj kiel en sia interna organizo, anstataŭ ilia ŝtata aparteno kiel nun.

La 20a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Olot de la 12a ĝis la 14a de oktobro 1984.

NEKROLOGO

Mortis tri akademianoj

Clelia Conterno GUGLIELMINETTI (1915-1984) mortis la 22an de januaro en sia naskiĝurbo Torino, Italio. Ŝi lernis Esperanton en 1934, kaj jam tiujare kunlaboris en la satira gazeto *La pirato* kaj la itala movada revuo *L'esperanto*.

Post la milito Clelia Conterno funkciis kiel direktoro de *L'esperanto* kaj vicprezidanto de Itala Esperanto-Federacio. Ŝi plenumis ankaŭ aliajn funkciojn kaj rolojn en la itala Esperanto-movado, kie ŝi viciĝis inter la plej kleraj kaj kompetentaj uzantoj de la Internacia Lingvo.

Sur la literatura kampo Clelia Conterno kontribuis al preskaŭ ĉiu kulture grava Esperanto-gazeto, per artikoloj, poemoj, eseoj, noveloj kaj recenzoj. Ŝi ricevis multajn diversajn premiojn, naciajn kaj internaciajn. Ŝi gajnis i.a. premiojn en Belartaj Konkursoj de UEA kaj poste mem iĝis ano de ties juĝkomisiono.

En 1969 aperis ĉe J. Régulo (Stafeto) ŝia originala poemaro *Eta vivo*. Gaston Waringhien nomis ĝin poemaro de neordinara kvalito.

En 1955 aperis ŝia specimena traduko el *La dia komedio* de Dante, sed ŝi poste – kun Waringhien – faris la gigantan revizian laboron por la unua eldono de la tuta verko, tradukita de Giovanni Peterlongo (1964), kiel ankaŭ por la dua eldono en 1980. De post 1964 Conterno estis membro de la Akademio de Esperanto.

En 1982 aperis ŝia *Unu tago post la alia*, tradukita el la itala de Roger Bernard. Ĝi estas pasia taglibra rakonto pri sopiroj kaj angoro de patriniĝo en la postmilita Eŭropo.

Aparte trista estas la fakto, ke la Estraro de UEA en sia decembra kunsido planis ĉi-jare distingi Conterno per la honora membreco. Ŝia konsento pri tiu propono verŝajne apartenis al la lastaj agoj de tiu klera virino, unu el la plej eminentaj en la ĝisnuna historio de la Internacia Lingvo.

Tazuo NAKAMURA (1911-1984): La 15an de januaro mortis en Kioto, 72jara, unu el la plej elstaraj japanaj esperantologoj: Tazuo Nakamura. Li antaŭe

estis konata sub la pseŭdonimo Teruo Mikami, kiun li uzis ĝis 1964.

Nakamura lernis Esperanton en 1929 kaj kontribuis antaŭ la milito al la unika revuo *Tempo*, lastatempe represita. Ekde 1950 li estis ĉefredaktoro de la revuo *Oomoto*, en kiu krom artikoloj pri la japana kulturo aperis pluraj studoj de Nakamura pri gramatiko kaj stilo. Pro ĉi-lastaj kaj pro sia kontribuo al la libro *Simpozio pri ata/ita* li estis en 1962 elektita en la Akademion de Esperanto.


Al la plej konataj verkoj de Nakamura apartenas *Enciklopedieto japana* (1964) kaj la traduko de la klasikaĵo de Tensin Okakura, *Libro de teo* (1965). Li kuntradukis *Rakontoj de Oogai* (1962) kaj kune kun Masao Miyamoto redaktis *Japana kvodlibeto* (1965), antologion de originala poezio kaj prozo de japanaj Esperanto-verkistoj.

Sen ia dubo, nur tre malmultaj japanaj esperantologoj tiom aŭdigis sin internacie kiel Nakamura. Li mem restis persone konata nur la kelkaj vizitantoj, ĉar dum la lastaj jardekoj de sia vivo li pro paraliziĝo estis katenita al lito.

Ivo ROTKVIĆ (1901-1983) forpasis en Zagreb, Jugoslavio, la 12an de decembro. Li lernis Esperanton en 1921, kaj du jarojn poste jam troviĝis inter la ĉefaj organizantoj de la unua jugoslava Esperanto-kongreso (1923) kaj de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kies sekretario kaj vicprezidanto li estis dum multaj jaroj. Rotkvić estis, inter la du mondmilitoj, rekordulo landa en la gvidado de Esperanto-kursoj kaj li eble pli multe ol kiu ajn alia influis la lingvan nivelon de la jugoslavia esperantistaro.

Kelkjara redaktoro de *Konkordo* kaj kunredaktoro de *Balkana konkordo*, Rotkvić pleje famiĝis en la Movado per sia literatura aktiveco. Unue libroforme aperis lia traduko de *Aŭtuna vespero* (1924) de M. Ogrizović. Tamen, la ĉefverko de la tradukisto Rotkvić estis la ampleksa romano *Cezaro* de M. Jelušić. Ĝia apero en 1934, ĉe Literatura Mondo, signis tutan novan epokon en la lingva evoluo de Esperanto, ne nur rilate la tradukan arton sed rilate la beletron ĝenerale. Sur la 530 paĝoj de tiu traduko, kies famo larĝe superas tiun de la kroatlingva originalo, Rotkvić uzis senriproĉan kaj eksterordinare esprimriĉan lingvaĵon, kiu unuafoje malkaŝis plurajn latentajn belojn de Esperanto. Io simila ripetiĝis multajn jarojn poste, kiam en 1961 aperis la traduko de *Tragedio en la Universo*, komuna verko de junaj zagrebaj astronomoj, kiun Rotkvić mem konsideris lingve supera al la traduko de *Cezaro*. Régulo-Pérez tiutempe nomis la novan tradukon "majesta fieriga atingiĝo".

Rotkvić estis ankaŭ eminenta oratoro, kiu enlande ofte, kaj eksterlande foje – i.a. festparolado en la Zamenhofa Jaro dum la 44a UK en 1959 en Varsovio – regalis la Movadon per sia unika stilo, kiu kapablis esti samtempe nobla kaj fajrolanga.



Klubo Zamenhof en Aplahoué

La Klubo Zamenhof en Aplahoué (Benino) pozis por ĉi tiu foto ĉe la Studio Etro en maniero, kiu abunde ŝvitigis nin, kiam ni volis reprodukti la bildon. Ni devis "levi" du klubanojn supren kaj iel munti iliajn vizaĝojn inter la aliaj kapoj. "Mi estas tiu kun ĉapelo", skribis Tchikpe.

AFRIKO

Esperanto-asocio ankaŭ en Benino

Mi konfesas, ke skeptikuloj kutime pravas en tiu ĉi mondo. Ankaŭ pri la agado por Esperanto en Afriko tiuj, kiuj asertas, ke la laboro tie estas vana, fiaskonta, bedaŭrinde pravas... foje. Vere, la malriĉo de Afriko ĝenerale malhelpas, ke homoj havu tempon, intereson kaj monon, por okupiĝi pri belaj idealoj.

Des pli ni fieru, se escepte la skeptikuloj malpravas... foje. Tian malpravon ni jam vidis pri Ebura Bordo, kie naskiĝis Eburborda Esperanto-Asocio kun kursoj i.a. en la Universitato de Abiĝano. Same en Nigerio, kie la porinstruista kolegio de Adeyami, provinco Ondo, fariĝis ŝaŭmanta fonto de aktiveco pro la agado de unu sperta esperantistino. (Pri tiuj sukcesoj vidu revuon *Esperanto* de junio kaj julio-aŭgusto 1983.) Alia ŝtato en okcidenta Afriko estas Benino, kie la sukceso estas eĉ pli granda.

En Benino ne estis eŭropano, sperta esperantisto, kiu venis, baraktis kaj venkis, sed estas la lernantoj mem, kiuj per granda lerto kaj entuziasmo sukcesas en la pionira laboro.

En 1982, pro korespondanonceto en revuo kaj sekva cirkulero de nia kunlaboranto Germain Pirlot, eklernis la lingvon juna lernanto, Tchikpe Privas. Proksimume samtempe iom pli aĝa vendisto, Zocli Francis, faris same. Iom poste Sossa Gilles. Tio estas normala. Ili estis inter dekoj, eĉ centoj da homoj, kiuj tiel komencis la lernadon perkorespondan. Same normale estis, ke ili devis ĉesi pro gravaj personaj problemoj.

Sed, kio tute ne estas normala, estis, ke Tchikpe, kaj iom poste Zocli, revenis al la kurso kaj entuziasme rekomencis lerni kaj agi. Precipe Tchikpe finlernis en rekorda tempo. Li nun posedas diplomon, kiel unu el la tre malmultaj, kiuj finis la tutan kurson per la noto 9, "tre bona".

Ni devas transsalti iom da monatoj. Mi citas el letero de la 30a de decembro 1983:

"En Aplahoué kaj Toviklin, kie mi mem instruas ĉiusemajne, la aferoj kreskas rapide, kaj ankaŭ en Dogbo dank' al nia amiko Zocli. Estas kluboj en Aplahoué kun 15 membroj, Toviklin (17 membroj) kaj Dogbo (10 membroj). Estas naskiĝanta klubo en Lokossa (grava urbo). Mi laboregas, por ke naskiĝu kluboj en Abomey, Parakou, Porto-Novo-Nalihin-gou kaj Cotonou. Mi jam kontaktiĝis kun la amikoj, kiuj gvidos la klubojn kaj nun ili akcele lernas en la kursoj. Ankaŭ en multaj partoj de la lando ekzistas personoj lernantaj per korespondado.

Mi sendas al vi foton de la klubo en Aplahoué, nomata Klubo Zamenhof. La kursoj en Aplahoué komenciĝis la 4an de decembro. Mi sendos fotojn ankaŭ de la aliaj kluboj. Necesas helpi nin per mono laŭ nia buĝeto. Ni urĝe bezonas lernolibrojn kaj vortarojn, kaj monon por pagi la kretojn, paperojn, poŝtmarkojn, vojaĝojn inter la lokoj. La buĝeto de 12 000 CFA (240 francaj frankoj) monate jam preskaŭ ne sufiĉas, kaj ni mem ne havas tiun monon. Ni ne povas pro tio jam meti anoncojn en ĵurnalon."

Pli frue Tchikpe jam informis pri sia prelego pri "Esperanto kaj la homoj" en Cotonou la 26an de oktobro. El tio rezultis la kreo de Benina Asocio de Esperanto-Amikoj, la elekto de direktanta komitato kaj provizora statuto. Tiam aliĝis 33 membroj. La direktantan komitaton eniris ses aktivuloj. Ĉiu membro pagas malgrandan kotizon, kiu egalas al kvar francaj frankoj monate. Intertempe en Dogbo Zocli kunvenigis grupon, kiu nomiĝas Benina Esperanta Voĉo.


Karaj skeptikuloj, kie vi estas? Kiu dubo ne forvaporigas post lego pri tiaj sukcesoj? Kiu ne tuj sendus leteron al la Benina Asocio (ĉe s-ro Tchikpe Privas, s/c Kikinigui Albert, PTT Aplahoué) kaj al Benina Esperanta Voĉo (ĉe s-ro Zocli Francis, Ets. Comodel, Place du Marché, Dogbo, Mono)? Kiu krome ne tuj sendus sian tutan kapitalon al Fondaĵo Azio-Afriko de UEA, por ebligi, ke niaj subvencioj al Benino kaj aliaj afrikaj landoj daŭru?

Hans Bakker

Kiom da lingvoj troviĝas en la mondo?

En julio 1983 aperis tuta numero de "Unesko-kuriero" dediĉita al la fenomeno lingvo. Pluraj niaj legantoj atentigis pri la fakto, rimarkita ankaŭ de ni, ke tiu revunumero de Unesko neniel aludis la seriozecon de la lingvo-problemo, kiun spertas la hodiaŭa mondo. Implicite, tamen, pluraj tekstoj tie kongruas kun la lingvo-politiko (se nomi ĝin tiel?) de la Esperanto-movado. Ni pensas unuavice pri la materialo, kiu bildigas la esencan gravecon de la naciaj lingvoj por la konservo de la nacia kaj kultura identeco. Ĉar estas ĝenerale dezirinde, ke la homoj, kiuj agadas por Esperanto, estu kiel eble plej bone informitaj pri ĉiuj aspektoj de la fenomeno lingvo, ni transprenas el alia periodaĵo – "Unesco Features" – la sekvan artikolon.

Neniu povas kun certeco diri, kiom da lingvoj troviĝas en la mondo. Tio ne signifas, ke troviĝas lokoj, kien lingvo-specialistoj ankoraŭ ne paŝis. Ĝis la 19a jarcento lingvistoj jam penetris profunde en Afrikon kaj en la nuna jarcento ili jam studis antaŭe nekonatajn lingvojn de Norda kaj Suda Ameriko. La kaŭzo de tio, ke oni ankoraŭ ne povas respondi al la demando "kiom da lingvoj troviĝas?" kuŝas en la manko de adekvataj kriterioj, por distingi inter lingvoj kaj variaĵoj de tiu aŭ alia lingvo.



Babelturo, pentraĵo de la flandra artisto Martin van Valkenborch (1535-1612)

Fakulojn frontas la eksterordinara komplikeco de lingvoj kaj ilia evoluo ene de la komunumoj, kiujn ili servas. La malaltgermana, la dialekto parolata en norda Germanio, frape malsimilas al la altgermana, parolata en la sudo; tamen ambaŭ estas variaĵoj de unu sola lingvo. Aliflanke la malaltgermana kaj la nederlanda apenaŭ diferencas, sed la nederlandan oni rigardas kiel memstaran lingvon. Kial? Ĉar, dum la historia evoluo de la germana popolo kaj ties kulturo kaj literaturo, elkreskis unu sola literatura lingvo, kiu funkcias kiel speco de superstrukturo, reganta la diversajn dialektojn, senkonsidere al la diferencoj inter ili. Nederlando, aliflanke, havis tre malsimilan historian evoluon kaj povis krei sian propran literaturan lingvon – la nederlandan.

Do ni devas serĉi historiajn kaj sociajn faktojn, pripensi la evoluon de verkado, la evoluon de la ŝtato kaj multajn aliajn faktorojn, por povi kompreni, kio estas lingvo kaj kio estas dialekto. La taskon ne eblas plenumi sole surbaze de prilingvaj scioj.

Kien meti la dividlinion?

Estas pripensinde, ke lingvo povas esti nur parolata kaj ne skribata. Ni supozu, ke tian lingvon oni parolas kun etaj diferencoj en najbaraj vilaĝoj, dum homoj en pli fora vilaĝaro parolas ĝin kun pli grandaj diferencoj, tiel ke la du grupoj da vilaĝoj spertas malfacilojn en la komunikado inter si. Kie ni dividu? Ĉu ni apartigu la parolataĵon en du malsamajn lingvojn aŭ ĉu ni grupigu la parolajn variaĵojn kiel dialektojn, esprimadojn de unu lingvo?

Tial ne surprizas, ke specialistoj tendencas skeptiki pri asertoj kiel tiu, ke troviĝas 3 000 lingvoj sur nia planedo, kun 12 000 dialektoj. Tiajn ciferojn eblas akcepti nur kiel proksimumaĵon aŭ ĝeneralan gvidilon.

La kapablo distingi inter lingvoj kaj dialektoj, kiel la aliaj okupoj de lingvo-fakuloj, estas gravaj ne sole por la celoj de scienca klasifado. Ĉiu lingvo estas netaksebla faktoro en la evoluo de la socio, kiu uzas ĝin, kaj neanstataŭigebla levilo por la popolo, kiu parolas ĝin. La junaj evoluantaj ŝtatoj de Afriko, Azio kaj Suda Ameriko bezonas hodiaŭ entrepreni urgajn paŝojn, por certigi, ke iliaj popoloj povu plene utiligi ĉiu sian nacian lingvon.

Tio estas laboro por lingvo-fakuloj kaj sociologoj. Verki manlibrojn en naciaj lingvoj, kompili kaj produkti vortarojn, ellabori skribsistemojn, organizi gazetarajn kaj disaŭdigajn sistemojn, eldoni librojn kaj krei sciencajn kaj teknikan terminarojn – ĉiuj ĉi agadoj necesigas multon rilate al rimedoj, energio kaj tempo. Kaj por ne malŝpari tiujn valorajn havaĵojn, necesas lingvo-politiko, kiu spegulas la realon kaj atentigas la potencialon por evoluo en la socio.

Planante sian lingvo-politikon, evoluantaj landoj ekaprezis la multflankan helpon de Unesko. Dum la pasintaj dekelkaj jaroj, Unesko organizis plurdekon da internaciaj kaj regionaj seminarioj por fakuloj, kiuj faris valorajn rekomendojn al la ŝtatoj-membroj de la organizaĵo. Pro peto de la evoluantaj landoj, Unesko regule disponigas alte kvalifikitajn ekspertojn, kiuj proponas al la koncernaj registaroj specifajn agadojn por la efika evoluigo de iliaj naciaj lingvoj.

Krei skribsistemojn

Apartan atenton oni kompreneble donas al la sperto de tiuj landoj, kiuj atingis ĝenerale agnoskitan sukceson en sia lingvo-politiko, kiel ankaŭ en la evoluigo de siaj naciaj lingvoj. En Soveta Unio, ekzemple, oni ellaboris skribsistemojn por preskaŭ kvindek lingvoj, inkluzive por tiuj de popoloj de la ekstremaj nordo kaj sudo. Dum la infanoj de la niĥa popolo, kiu nombras ne pli ol 4 500 homojn, ricevas sian elementan edukon per la rusa, la interlingvo de Soveta Unio, grandnombraj popoloj, kiel la kirgizoj, povas ricevi la tuton de sia eduko, de la infanĝardeno ĝis la universitato, per la kirgiza, unu el la lingvoj, kiuj akiris sian skribsistemon nur post la revolucio de 1917.

Laikoj foje demandas, ĉu entute valoras evoluigi naciajn lingvojn, kiuj neniam havis sciencan priskribon de sia gramatiko aŭ gravan literaturon. Ĉu ne estus pli simple por ĉiuj popoloj uzi la larĝe disvastigi-

tajn lingvojn, en kiuj la grandaj romanoj kaj dramoj de la mondo estas verkitaj kaj kiujn hodiaŭ uzas centmiloj da kleruloj kaj sciencistoj? Finfine, du trionoj de la monda loĝantaro legas kaj skribas en unu el dek unu lingvoj, el kiuj kelkaj havas centmilionojn da parolantoj. Tiuj estas la ĉina, hindia, angla, hispana, rusa, araba, bengala, portugala, germana, franca kaj japana.

Inter tiuj lingvoj estas tiuj, kiujn oni plej vaste instruas kiel fremdajn lingvojn. Landoj kiel Srilanko, Lesoto, Afganio, Birmo, Ĉinio, Korea Popola Respubliko, Vjetnamio kaj Laoso jam realigas projektojn, ellaboritajn de Unesko kaj la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, por plibonigi la instrumentojn por fremdaj lingvoj.

Finfine, tiuj, kiuj regas fremdan lingvon akiras aliron kaj al la plej lastaj atingoj en la scienco kaj teknologio kaj al literaturaj majstroverkoj, amasiĝintaj dum pasintaj jarcentoj. Tamen, estus naive kredi, ke fremda lingvo povas forpeli nacian lingvon kaj preni ĝian lokon.

La vera esprimo de nacia identeco povas esti nur la nacia lingvo de la popolo, kiu de jarcentoj estas uzata, por komponi ĝiajn legendojn, ĝiajn kantojn kaj rakontojn, ĝiajn proverbojn kaj popoldirojn, la lingvo, kiu iĝis la ujo kaj spegulo de ĝia multjarcenta sperto. Fakte, la nacia lingvo kaj fremdaj lingvoj prezentas komplementajn polusojn en la nuntempa aranĝo por edukado.

Viktor V. Koptilov

FAKA AGADO

Ĉu parolanta vortaro eblas?

La sekva teksto estas verkita por "Esperanta ligilo", organo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), aliĝinta faka asocio de UEA, kun ĉ. 500 membroj. Ni represas la artikolon de la redaktoro de tiu periodaĵo unuavice por atentigi kiel grandegajn problemojn frontas la blindaj esperantistoj kiam ili provas havigi al si kelkajn bazajn verkojn de la Internacia Lingvo. Kvankam la celo de la teksto ne estis varbi financon apogon al la klopodoj de LIBE, ni aldonu, ke tiucelaj donacoj estas ĉiam bonvenaj, ĉu pere de UEA, ĉu rekte al LIBE mem.

Baldaŭ ni disponos pri brajla eldono – en verŝajne dek grandaj volumoj – de *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. En bibliotekoj, lernejoj, kluboj, eĉ en la hejmoj de kelkaj privilegiitaj individuoj tiu grava verko estos nepre bonvena kaj tre utila. La evento neeviteble revenigos al niaj oreloj la opinion, ke estus ja tre oportune, se ni disponus ankaŭ pri tia eldono de

Plena ilustrita vortaro (PIV). Ni tamen devas resti objektivaj. Jam pluraj seriozaj esploroj montris, ke en la nunaj cirkonstancoj brajla eldono de PIV estas absolute neebla pro la gigantaj laboro kaj kosto, kiujn ĝi prezentus. Sed kelkaj sugestis, ke eble oni povus realigi surkasetigon de tiu verko. Koncerne tion, mi menciis faritan eksperimenton, el kiu ni povas ĉerpi valoran instruon.

En franclingva brajla revuo, organo de blindaj interesitoj pri krucvortenigmoj, Duchon-Doris raportas, kiel li realigis por si mem, per sesjara klopodado, kasetan registron de konata franclingva vortaro. Celante esence la verkadon, solvodon kaj kontroladon de krucvortenigmoj, li konservis el la vortaro nur la literumon de la vortoj kaj iliajn fundamentajn difinojn kaj cetere utilajn detalojn. En tiaj kondiĉoj la tuto ampleksas 97 kasetojn C60 (kun 30-minuta daŭro por ĉiu trako). Li ordigis la kasetojn en speciala bretaro, el kiu ili estas facile kaj rapide preneblaj. Krom surkasetaj markoj, li pretigis brajlan indekson kun indikoj por ĉiu trako de ĉiu kaseto. Dank' al tio li bezonas por la konsultado tempon de inter 90 sekundoj kaj du minutoj por iu vorto. Laŭ lia

sperto tiu metodo estas pli rapida ol konsultado per la sistemo optakono.

La menciita franca vortaro estas proksimume samformata kiel *PIV* kaj la surkasetigita parto (komunlingva) etendiĝas sur 1 085 paĝoj. Se oni konsideras la spacon de la desegnoj kaj de la enciklopediaj informoj ellasitaj, oni facile povas kalkuli ĝis amplekso de inter 500-600 paĝoj. *PIV* (sen la finaj tabeloj kaj bildoj) ampleksas 1 213 paĝojn, el kiuj serioza reprodukto ne povas multon ellasi. Tio signifas, ke "parolanta" eldono necesigus almenaŭ 180 kasetojn C60. Tio donas ideon pri la registrotempo, la spaco kaj la kostoj (pensu ankaŭ pri la nemankipova speciala bretaro), kiujn postulus tia eldono. Ĉu ĝi rekte interesus multajn el ni? Ĉu tio entute eblus?

Raymond Gonin

REAGOO

Plian fojon pri *Koreo/koreano*

Sekvas du asertoj, ke la formoj "Koreo/koreano" estas la solaj ĝustaj rilate al tiu lando. Tiu lingva problemo ŝajnas esti malgrava, sed ĝi levas kelkajn bazajn demandojn, kiujn la du leteroj eble ne plene solvas: Ĉu estas tolerebla en la skemisma strukturo de Esperanto la almenaŭ ŝajna escepto en, ekzemple: ĉino, hindo, japano, koreano? Kiom valoras la propra struktura reguleco en la tutmondiĝo de Esperanto, kompare kun ties eŭropdevena vortaro? Kiom Esperanto fakte estas dependa de siaj eŭropaj fontolingvoj? Kio estas la ĝusta rilato inter nacilingva etimologio kaj la reala funkcio de la Internacia Lingvo?

Pri la formo *Koreo/koreano* – trovebla en *PIV* – mi legis aserton en *Esperanto* (junio 1983, p. 112), laŭ kiu tiu formo rezultus el "eŭrocentrismo historia rigardo". Ni ĉiam gardu nin de bombastaj kaj pseŭdosciencaj esprimoj, sed ĉi-okaze ni devas plie severe protesti kontraŭ tia misprezento kaj tia tordo de la faktoj.

Se per "eŭrocentrismo" oni volas diri, ke ĉiuj lingvoj de Eŭropo (latinidaj, ĝermanaj, slavaj, finnugraj kaj aliaj) posedas vortformojn similajn al *Koreo* kaj *koreanoj*, tio estas sendube vera. Sed se oni volas kredigi, ke tiuj vortformoj ne estas konataj en la ceteraj lingvoj, tio estas vualado de la nudaj faktoj: similaj vortformoj por la landnomo kaj similaj vortstrukturoj por la landano-nomo estas troveblaj ankaŭ en ekzemple la hindo-iranaj lingvoj (sanskritidaj: la hindia, bengala, sinhala kaj la persa), en diversaj orientaj (la araba, hebrea, indonezia), en afrikaj kiel la svahila kaj aliaj...

Ĉu do eŭropanoj inventis tiujn vortformojn kaj trudis ilin al la tuta mondo? Neniel! Ili simple devenas de la malnova japana nomo *Kōrai* "Alta belo", kiu mem venas de la korea nomo *Kaoli*, kiu iam nomis korean regnon (918-1393).

La konkludo estas, ke oni ne povas paroli pri "eŭrocentrismo", sed oni ja nepre devas paroli pri monda internacieco de *Koreo/koreanoj*.

Aliparte, se oni tamen volas uzi la pure inventitan *Koreoj/Koreujo/Koreio* (la sufikso ne gravas!), oni eventuale sin defendu ne per erara ŝirmilo, sed per la *etnografia principo* iam proponita de la "markizo" de Beaufront-Chevreaux (1898). Sed tiam, kial preni radikon kaj trudi al ĝi signifon, kiun ĝi havas en neniuj lingvoj? Ĉu ne pli simple preni la etnan radikon *hanoj* (el la korea *han*) kaj la landnomon *Hanlando*, traduko de la aktuala korea *Hangug*, kaj simila al la japana *Kankoku*. Nur bedaŭrinde, ke en la ĉina la sama vortformo *han* ne signifas koreano sed ĉino; dume, en la "Centra regno" la lando *Koreo* nomiĝas *Chaoxian* (Ĉoseno, "Matena freŝo") kaj la koreanoj – *chaoxianren* (ĉosenanoj) aŭ ankaŭ *gaoliren* (koreanoj) el *Gaoli* (*Koreo*).

Tamen ne akuzu, iel reciprokante, pri aziocentrismo, ĉar eĉ ne temas pri koreismo; temas nur pri doktrina apliko de la etnografia principo, interne de la nura Esperanto! Absurda, ne aplikebla kaj ne-fundamenta principo! En la ordinara vortaro ne ekzistas aliaj same tiel monde internaciaj nomoj kiel la landnomoj!

André Albault (Francio)

En la junia numero de via revuo aperas recenzo de Yukio Izumi pri la ĵus aperinta *Korea-Esperanto Vortaro*. La recenzanto asertas, ke la landnomo *Koreo* kaj la popolnomo *Koreano* (troviĝantaj en *PIV*) estas absurdaj kaj "baziĝas sole sur eŭrocentrismo historia rigardo", dum la ĝustaj formoj (supozeble laŭ etnolingva vidpunkto) devus esti *Koreo* por la landano kaj *Koreujo* (aŭ *Koreio*) por la lando.

Mi volas rimarkigi, ke la ĝenerala principo, laŭ kiu Zamenhof esperantigis land- kaj popol-nomojn, ne estas devenigo de tiuj nomoj el la respektivaj etnolingvoj, sed akcepto de "internaciaj" formoj, kiuj estas fakte la latinaj aŭ latinidaj formoj. Tiel do ni havas la formojn *germano/Germanujo* (aŭ *Germanio*) kaj ne *dojĉo/Dojĉlando*, *hispano/Hispanujo* ne *espano/Espanujo* aŭ *espanjano/Espanjo*, *hungaro/Hungarujo* ne *madjaro/Madjarujo* (aŭ *Madjario* aŭ *Madjarlando*), *polo/Polujo* ne *Polsko* aŭ io simila. Ĉu tiu principo estas erara? Ĉu ĝi ne plu validas? Oni rajtas defendi ĉi tiun starpunkton, sed tiuokaze oni devas revizii multajn land- kaj popolnomojn. La formoj *Koreo/koreano* konformas al la ĝenerala principo Zamenhofa, do ili estas la ĝustaj formoj ĝis oni ŝanĝos tiun principon.

Umberto Broccatelli, Italio

La eternaj angloj

La 40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos de la 13a ĝis la 20a de julio 1984 en Swanwick, Britio. Por prezenti la kongresan landon al siaj membroj, TEJO elfosis la sekvan tekston, kiu unue aperis en "La nica literatura revuo" (n-ro 26, novembro-decembro 1959), kaj petis ĝian aŭtoron, akademian Reto Rossetti, pri ioma aktualiga reverko. Kiel brila ideo tio estis, vi konstatos jam en la unuaj frazoj de tiu fascina lekcio pri la Esperanta verkoarto.

Kiel konate, la angloj loĝas en Anglujo. Ilin disigas de Eŭropo 40 kilometroj da markolo kaj alta monto da memestimo. Laŭ angla vidpunkto la homaro parolas du lingvojn: angle kaj fremde. La fremduloj iom post iom lernas la anglan lingvon, por kiu la ceteraj lingvoj estas surogato, kaj finfine la tuta homaro posedos la solan lingvon imageblan por ĝusta homo. Ĝi ankaŭ estas la sola lingvo, kiu skribas "mi" kun majusklo.

Tiu lingvo estas kompreneble perfekta. Inter ĝiaj amindaj ecoj estas tio, ke aŭdinte novan vorton oni devas serĉi en vortaro ĝian ortografion, kaj vidinte novan vorton oni devas serĉi en vortaro ĝian elparolon. Ĝi havas nek refleksivan pronomon nek subjunktivon, kaj la futuro kaj kondicionalo havas po du formoj, kiujn scias manipuli la sudaj angloj sed nek la nordaj angloj nek la skotoj nek iu alia. Mankas vorto por "homo" kaj "naski" sed kompanse troviĝas tridek sep manieroj diri "ĉu ne?" La lingvo portas 22 vokalojn, la frazo havas fiksan vortordon, kaj la sama vorto povas esti substantivo, adjektivo aŭ verbo laŭ sia lokiĝo en la frazo. Tio ĉi kondukas al multaj amuzaj miskomprenoj kaj amasaj ebloj de vortludo.

Por aliaj lingvoj, kiuj estas fonetikaj, akcentregulaj, posedas refleksivon ktp. la angloj havas kompton, se ili entute ion sciis pri ili. La kelkaj angloj, kiuj lernas fremdan lingvon, sin sentas renegatoj, sed sian kulpon ili malpezigas, plibonigante la fremdan lingvon per angla prononcado kaj angla gramatiko. Tio faras ĝin pli kultura.

Al la pitoreska kaoso de sia lingvo la angloj aldonas aliajn ĉarmajn kaosojn. Oni povas diri entute, ke por kaoso la angloj havas specialan talenton.

Kiam temis pri poŝta kodo estis antaŭvideble, ke la angla genio atakos ĝin tute originale, kvazaŭ novan astron sur la monda firmamento. Kion fari, la angloj estis ĉie pioniroj: pioniroj de industria revolucio, de taksioj (ankoraŭ ĉiu taksio portas la oficialan nomon "ĉeval-kaleŝo" – *hackney carriage*), senkapigo de reĝoj, kaj rostita pano. Do ignorante la eŭropajn poŝtokodojn kun ilia mizera vico de dek cifere-simbo-

loj, la angloj brile aldonis al tio la 26 literojn de la alfabeto, skuis ĉion en koktela miksililo, kaj elŝutis ĉion sur la britan mapon. La rezulto estas volapukaĵo riĉa je konfuzoj, kun 0 kaj 1 jen kiel ciferoj, jen kiel literoj, kaj karamboloj inter rapide skribitaj Z kaj 2, 5 kaj S. Nu tiu bunta artverko havas sian koston, ekzemple tion, ke ĝi venkas la plej saĝan komputilon. Bagatelo! Tutsimple oni sidigas en ĉiu poŝta centro homon kun skribmaŝino, kaj dum defilas antaŭ li la leteroj, li interpretas kaj tajpas la ciferojn, kiujn la komputilo jam scios digesti.

Simila ĝangalo estas la angla eduka kampo, kiu ampleksas dudek naŭ specojn de lernejo. Oni nomas tion "eduka sistemo" kaj, kun supera logiko, oni nomas la elitajn privatajn lernejojn "publikaj".

Aŭ rigardu la anglan valuton. Pri la klasika monsisistemo ni jam ne parolas, ĉar fine oni ĝin ŝanĝis al dekuma aranĝo, dividante la pundon ne je cent, sed je ducent eroj: la ducentonon oni nomas duonpenco. Logike oni devus ĝin esprimi per trialoka decimalo, ekz. £ 1.005: ĝeno, kiun la angla genio tuj solvis, skribante ĝin $\frac{1}{2}$, kaj tiun frakcion oni kroĉis al la decimalo: iu varo povas do kosti £ 1.99 $\frac{1}{2}$, matematika gulaŝo unike angla, kaj rafinita turmento por infanoj en lernejo. (Aldone notu, ke la decimaloj oni en Anglujo apartigas per punkto kaj ne per komo, kiun oni utiligas por montri milojn: du milojn la angloj cifere skribas 2,000.) Nu, post 15 jaroj da devaluo, tiu mizera duonpenco ŝrumpis mikroskope kaj oni ĵus dekretis kompateme ĝian estingon en 1985.

La angloj amas la bestojn kaj antaŭ ĉio la hundojn. Kiam la rusoj en 1957 suprensendis hundeton



Duetaĝaj busoj kaj anitkvaj (tamen komfortaj) taksioj apartenas al la ĉeftrajtoj de Londono.

**En la financa
kvartalo
de Londono
ankaŭ la
modo estas
eterna.**



en sputniko, miloj da geangloj protestis furioze al la ĵurnaloj, deputitoj kaj rusa ambasado; sed kiam la usonanoj suprenpafis simion oni apenaŭ atentis, ĉar simio tro similas homon. La usonanoj tamen iom riskis kaj estonte ili farus pli prudente, ekspedante pigmeon aŭ orfon.

Oni scias, ke la angloj estas lakonaj kaj modestaj. Ili elokvente klarigas sian lakonecon kaj verve informas pri sia modesteco. Ili estas ankaŭ flegmaj, kaj tre ekscitiĝas, se tion vi ne volas kredi.

Ili amas la simplan anglan kuiradon, kiun ili manĝas tre rapide, ĉar estas iel nedece okupiĝi longe pri la sinnutrado. Ili same rapidas tra siaj stratoj kun urĝa celo, ekzemple al kontoro aŭ kinoteatro, kaj ili ne imagas, ke strato povas esti renkontejo, restoracio – babilejo, aŭ homaj interrilatoj grava tagokupo. Ankaŭ la restoracioj havas signon de urĝeco: oni rapide glutas sian manĝon kaj transdonas sian seĝon

varma al la postveninto. Oni faras tion des pli volonte, ke temas pri simpla angla kuirado.

Oni tamen ne pensu, ke la angloj ne ŝatas Eŭropon. Ĉiam amase ili vojaĝas tien, kunportante en falango sian lingvan medion kaj gvidate al turistaj hoteloj, kiuj garantias la simplan anglan kuiradon. Multaj angloj verdire ankaŭ aventuras pri kontinenta kuirarto, indulĝe ĝuas ĝin, eĉ konsentas pasigi ĉe ĝi pli ol dek kvin minutojn, sed estas ja libertempo, kaj post la frivolo ili revenas al la sobra angla rutino aŭ, kiel ili sprite ĝin nomas, "vivmaniero".

Apartenas ankaŭ al la admirinda angla vivoordo, ke ĉiuj butikoj fermiĝas je la kvina, ĉar ankaŭ la butikistoj devas fari siajn aĉetojn, kaj ĉiuj drinkejoj kaj amuzejoj fermiĝas je la deka vespere, ĉar ties komizoj devas ankaŭ amuziĝi. Kiel ili faras tion estas profunda angla sekreto.

Alia aminda angla moro estas fermi ĉiujn drinkejojn inter la dua tridek kaj la sesa ĉiutage. Tio efektive ĝenus, se Anglujo havus varman, do soifigan klimaton, sed feliĉe, kiel ĉiu anglo vin informos, oni havas klimaton moderan. Pro tiu klimatomodero anglaj viroj promenas somere sen ĉapelo kaj ricevas sunfrapon. Kaj vintre ĉiu neĝofalo tuj kreas tutlandan krizon, ĉar oni ne atendas tion en nia milda klimato, kiun vartas ja la oceana fluo el la meksika golfo.

Estas angla aksiomo, ke tio, kion oni faras en aliaj landoj, reale ne ekzistas. Sekve ĝi ne helpas al anglaj problemoj, ekzemple ĉu gea edukado estas praktika. La fakto, ke de longe ĝi estas ĝenerala en Skotlando, nenion signifas, ĉar Skotlando estas parto de Fremdujo. Eĉ io farita en Anglujo de neangloj ne havas efektivan gravecon. La romianoj en la jarcentoj I-IV konstruis ĉi tie rektajn vojojn, sed ili evidente ne komprenis la indiĝenan animon, ĉar ĉiuj postaj vojoj zigzakis kaj serpentumis eĉ sur plej plata ebena. Nur kiam la angloj mem faras ion, nur tiam ĝi eniras en la realon. Kiel en 1959 la unua angla aŭtoŝoseo apud Preston, tutajn 15 kilometrojn longa kaj kompreneble kurba. Al ĝi gravitis aŭtistoj el la tuta lando, por karuseli senbride sur la nova ludilo. Kun ĉarma arkaismo oni nomas tion "motorvojo" dum la angla logiko diktis por la eliroj la terminon "interŝanĝoj" kaj la mezan barilon aŭ strion oni baptis "centra rezervejo", kvankam tie ne loĝas indianoj.

Sed unue kaj laste la anglo estas tolerema. Tial mi povas verki senpune ĉi tiun artikolon. La angloj, kiuj ĝin legos, nur ridos senĝene, ĉar ili ŝatas la komplimenton esti temo de artikolo kaj la pinta enhavo ilin ne tuŝas, ĉar tio estas kutima petolo de humoristo. Kaj ili komprenas, ke ankaŭ humoristoj devas esti, same kiel fremduloj, rektaj aŭtoŝoseoj, metra sistemo kaj simila ekzotikaĵo. Ĉio tio kontribuas al la bunteco de la vivo, farante dekoracian kadron por la solida realo de la angloj en sia Anglujo.

Reto Rossetti

Pri kvin lingvoprojektoj

Il castigliano come base e mezzo di pianificazione interlinguistica, Valerio Ari. Bellinzona: "Hans Dubois", 1983. 50p. Mimeo. 30cm. Prezo: 15,00gld.

Antaŭ kelkaj jaroj, stimulte de la riproĉo al Esperanto, ke ĝi estas eŭropa lingvo, mi demandis min, kiel aspektus internacia lingvo elpensita de aziano; kaj tute ne fortimigite de mia nescio de la japana, mi decidis skizi projekton, kia ĝi estus elpensita de japano: sufiĉus rigardi la tabelojn en la *Japana gramatiko por esperantistoj* de Wijatake-Seidi (1939). Rezigno ne malrapidis.

La nuna verko prezentas al ni, kun plenaj morfologiaj detaloj, kvin projektojn, elpensitajn inter 1897 kaj 1972, kies bazo estas unu sola el la eŭropaj lingvoj, la hispana (kastilia): Nuove-Roman (1897), Hom-idyomo (1921: kun tildo, Y, W kaj nova litero, ina kaj neŭtra vortoj por "ilia", helpverbo "havi"), Mond Linguo (1937: kun genitivo, kaj reviziita: sen genitivo kiel Mond Lingua en 1956), Neo-latino (samtempa kun Interlingua, al kiu la elpensinto, eks-esperantisto, aliĝis), Anglo-latino (1972: kun futuro *wil*, kondicionalo *wud*). Sekvas la nomoj de kvar projektoj kun simila bazo, kies detaloj ne estas konataj: Salvador (1909), Menemo (1922), Casuela (1927), Panamericano (ĉ. 1950).

Ŝajnas esti fakto, ke Zamenhof ne sciis la hispanan lingvon (kp. Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, p.182), kaj ĉi tio klarigas, kial tiu lingvo ne povas esti nomita inter la fontoj de Esperanto, – fakto, pro kiu la meksikiano F. Azorín severe skoldis min post la apero de mia samnoma artikolo (1956). Estas ja signife, ke la elpensinto de Mond Lingua estis italo (la aliaj parolis la hispanan). La lingva idealo, al kiu ili strebis, estis la homogeneco (ĝuste tio, kion serĉis Zamenhof en sia reform-projekto); sed estas verŝajne, ke Esperanto gajnis el sia ĝermana dozo, ĉar tiel ĝi ampleksis almenaŭ kontinenton, do faris pli longan paŝon al mondamplekso, ankaŭ pro la kontribuaĵo de la rusa lingvo pere de la sintakso, pri kiu eble Zamenhof eĉ ne konsciiĝis. Aplikante la kriterion de kohereco ("interadaptitaj partoj" – PIV), la aŭtoro preferas la projekton Neo-Latino, kvankam agnoskante, ke tio kunportas pletoron da neregulaj verboj; kaj li atentigas, ke la aŭtoro de Mundi Lingua kritikas alian projekton Interlingua, pro manko ĝuste de kohereco. Li sagace rimarkigas, ke ĉi tiuj projektoj implicas kritikon al Esperanto – kaj ĉiuj malsukcesis. Esperanto, kiel li resumas, estas speco de piĝino (dua senco laŭ PIV) kaj submetita al ties reguloj de evoluado.

Nur Nuove-Roman trovas mencion en *Historio de la universala lingvo* de Couturat kaj Leau (1903 – do necese). Ĉu kvin troviĝas en *Historio de la mondo-lingvo* de Drezen (1931), mi ne scias, ĉar neprudente mi utiligis mian ekzempleron kiel devizon por abonado. Interesitoj mem kontrolu, kaj dume notu, ke Anglo-lat, kune kun la simila Frendo (1973), estas diskutata de Bernard Golden en *Planlingvistiko* 3 (1982). Plue, al Apolema, kiel grek-baza, aldonu la projekton Interglossa de L. Hogben (1944).

Ĉi tiu suko troviĝas inter Enkonduko al la Interlingvistiko kaj traduko de eseo de J.L. Borges pri la Lingvo Analiza de John Wilkins (1668). Valerio Ari (pli bone konata pseŭdonime kiel Giorgio Silfer), iama redaktoro de *Literatura foiro* kaj *Kontakto*, bone meritis sian doktoriĝon.

D.B. Gregor (Britio)

Post longega, amplena laboro ...

Krestomatio de Esperanta literaturo; Tekstoj, dataro, bibliografio, red. István Szerdahelyi (1924). Budapeŝto: Tankönyvkiadó. Mimeo. 24cm. **Vol. 1**, 1979. 466p. Prezo: 19,80 gld. **Vol. 2**, 1981. 326p. Ilus. Prezo: 18,00 gld. **Vol. 3**, 1982. 476p. Ilus. Prezo: 18,00 gld.

La unua volumo de ĉi tiu literatura krestomatio komenciĝas ĉe L.L. Zamenhof; sekvas unue verkistoj el la teritorio de la tieepoka Rusa Imperio: poloj, rusoj, estonoj, latvoj; poste venas pioniraj aŭtoroj el sud-orienta kaj meza Eŭropo. La dua volumo gvidas la legantaron tra Hungario, Aŭstrio, Germanio, Skandinavio, Finnlando, Islando kaj Benelukso. Volumo 3 montras la pioniran laboron por Esperanto en Francio, Svislando, Italio, Iberia Duoninsulo, Latin-Ameriko, Britio, Nord-Ameriko, Aŭstralio, Afriko, Turkio, Palestino, Persio kaj Azio ĝis inkluzive Ĉinion kaj Japanion.

Legante en tiuj praverkaĵoj, mi iom ekdubis pri la praveco de la aserto de William Auld, enkonduke al *Esperanta antologio*, ke neniuj poeto kaj neniuj poemo grava el la komenca tempo estis forgesita de li. Estas ja vere, ke foje tie ĉi (apud multaj verketoj ne tiom indaj) oni trafas nekonataĵojn ankoraŭ tute freŝajn. Sed precipe tio validas pri la tradukaĵoj.

Kiel oni povus atendi, plurfoje oni renkontas la konatajn frutempajn (ho eternaj komencantoj!) baraktadojn pri *sia* aŭ *lia*, pri la participoj, pri la artikolo, sed entute estas vere mirinde, ke homoj post foje treege mallonga tempo jam verkis sufiĉe purstile. Utila precipe por instruado, estas tio, ke en pluraj kazoj Szerdahelyi sukcesis trovi paralelajn tradukojn de la sama poemo. De la fame konata "Lorelej" de



Sistema studado de la diversaj aspektoj de Esperanto: Prof. István Szerdahelyi

Heinrich Heine; li donas eĉ kvin tradukojn, kun plezuro kaj utilo kompareblajn en literatura seminario.

Se prijuĝi la *Krestomation*, komparante ĝin kun nacilingvaj verkoj pri la komenctadia nacia literaturo, ĝi estas relative mankohava. La bibliografiaj indikoj foje estas iom kaosaj. Estus preferinde pli rigore sistemigi tiun eron en estonta eldono. Ankaŭ datoj aŭ simplaj faktoj (ekz. paĝonombro de libro) foje senplie mankas. Tion la aŭtoro ja konscias, kaj li petas legantojn plenigi tiujn "truojn". Sed el tiuj detaloj oni komprenas, kiel pene estas verki kiel la unua en la mondo tian superrigardon pri la unuaj jardekoj de nia lingvo. Kompari ĝin kun nacilingvaj samspecaĵoj ja ne estas plene juste: tiujn jam antaŭiris generacioj da antaŭuloj.

Plia problemo estis supozeble, ke Szerdahelyi ne disponis pri ĉio ekzistanta. Li ne utiligis la en Japanio eldonitan *Plena verkaro de L.L. Zamenhof* de Ludovikito. Ties komentoj kaj kronologiaj kalkuloj povus pliprecizigi plurajn detalojn. (Ekz. pri Louis de Beaufront, Vol. 3, p. 16 k.c., kial mankas, ke li kunlaboris en la revuo *Lingvo internacia*? Mankas pluraj verkoj liaj: *Manuel complet* (1892), *Introduction et manuel* (1893), la franca traduko de la Ekzercaro (1896), *Petite brochure...* (1896), *Sola vera solvo de la lingvo internacia* (1898), *Commentaire sur la grammaire* (1900). Kaj, se ĉe Moch estas indikita verko lia en Ido, kial ĉe de Beaufront tute mankas indikoj pri lia aktiveco tiutere?).

Paroli pri mankoj estas sufiĉe facile; eviti ilin postulas superhoman forton. Ni estu justaj: Szerdahelyi per longega amplena laboro elfosis veran trezoron da praaĵ Esperanto-tekstoj, kaj originalaj kaj tradukitaj. Lian verkon kompletigu la komuna laboro de esperantologoj plurnaciaj: ĉiu sendu siajn komentojn kaj aldonojn al li. Ili certe estos bonvenaj! Sed intertempe jen pretiĝis verko, kiun bonege eblas uzi okaze de instruado pri lingvo-evoluo, pri literatura stilformiĝo, pri reciproka influado de aŭtoroj ktp. Guste por tio la *Krestomatio* estis kompilita.

La tipografia aspekto de la tri volumoj de la *Krestomatio* ne estas tre altnivela; supozeble ia ŝparemo flanke de la universitato tion kaŭzis. En Volumo 1 oni uzis nur unu literspecon, kio kelkfoje ete erarigas: citaĵoj *pri* aŭtoro aspekte samimpresas kiel citaĵoj *el* liaj verkoj, same kiel eldiroj de Szerdahelyi *pri* ambaŭ. La aŭtorojn montras al ni lerte faritaj desegnaĵoj. Volumoj 2 kaj 3 plurilate pliboniĝis. Oni ekutiligas du literspecojn, por distingi inter teksto kaj komento, aŭ (ĉe teatraĵo) inter la teksto dirota de la aktoroj kaj la reĝisoraj indikoj ktp. Tamen, tiun eblecon oni ne ĉiam eluzis. En Volumo 3, p. 126/7, ekzemple, troveblas mallongigo de rakonto tuj sekva (eĉ sen paŭzo-linio) de citaĵo *el* la rakonto mem – ambaŭ en la sama literspeco, dum en la sama rakonto oni ja uzis ambaŭ literspecojn distingociele! En ĉi tiuj du volumoj la aŭtorojn montras (se troveblis...) fotoj. Ankaŭ jene konstateblas certa pliboniĝo: la trian volumon finas tre detala kaj bonvena (kaj ĉe la antaŭaj tiom sopirata) nom-indekso.

Estas bedaŭrinde, ke ne eblis bindi ĉi tiujn unikajn verkojn. Sed la eksteraĵo nepre ne fortimigu la literaturamantojn.

Ni esperu, ke la fako Esperantologio kaj Interlingvistiko de la Universitato ELTE en Budapeŝto ankoraŭ longe povos same fruktodone plulabori. Kaj espreble ankaŭ aliaj universitatoj foje povos imiti ĝin.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Diskutinda traktaĵo

Sociekonomiaj problemoj de ekologio, Hristo Marinov. Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1981. 107p. Mimeo. 29cm. SUK-kursotekstoj 32. Prezo: 19,80 gld.

La naturo povus pluekzisti sen la homo, sed ne inverse. La nuntempa evoluo (aŭ misevoluo) de la scienco kaj teknologio trokredigas al ni, ke estonte la homo povos vivi ekster la naturo kaj ĝiaj cikloj. Sed nia ĝisnuna scio estas tia, ke ni kapablas delasi guton da inko en puton da akvo kaj interpreti kiel ambaŭ likvaĵoj intermiksiĝas, sed ne kapablas elpreni la inkon!

La ekologio estas la scienco, kiu studas la interrilatojn de diversaj sistemoj en la naturo. La defio al la

ekologio estas la demando, kiel konservi amikecan kaj sendanĝeran medion.

Tiu ĉiu libro superrigardas la kurantajn aferojn ĉi-kampe. La enhavon la verkinto apartigis en du sekciojn. La unua, "Sociekonomia bazo de la nuntempa ekologia krizo", traktas la politikajn kaj ekonomiajn barojn, kiuj kaŭzas la malordon. La aŭtoro plendas pri "okcidenta kapitalismo", ke ĝi fuŝas la medion, produktante nenecesajn varojn. Li delikate pesas la raportojn de la Roma Klubo, privata fondaĵo, kiu studas tiajn ĉi problemojn, sed tra la tuta verko fonas la marksisma vidpunkto. Kelkaj aludoj al socialisma planado ŝajnigas la opiniojn polemikaj, sed orienta Eŭropo sekvas okcidentajn metodojn en industriigo kaj respondecas pri sia profanado. Tamen la tuto de la unua parto estas trastudinda, ĉar ĝi iom eksplikas la influon de la prahomo al la naturo kaj inverse, donas opinion pri la ekologia estonteco en orientaj kaj okcidentaj landoj, traktas edukon al zorgo pri la naturmedio, donas kelkajn modelojn kaj multe pli.

La dua parto, "Ekologiaj disponfontoj por elnutro de la loĝantaro", resumas la eblecojn por la pluvivo de la homo sur la tero, statistikas kun ampleksaj tabeloj kaj nin esperigas, ke ankoraŭ estas ebleco pentofari. Ankoraŭ estas grandaj naturfontoj netuŝitaj, do oni devus ŝanĝi defunde la tutan ekonomian strukturon de la mondo, por egalrajtigi ĉiun profiti el la naturo simile kaj altnivele.

La libro havas optimismen finon. Marinov skribas, ke la "nuntempa streĉo tute ne signifas, ke la homaro jam atingis la "plafonon" de siaj eblecoj de produktado de nutraĵo". Li turnas nin al Hinda Unio kaj Ĉinio, kiuj atingis la duonon (aŭ iom pli) de la teoria ebleco por loĝigo, kaj al la maro, de kiu oni utiligas nur 15% de la areo por fiŝkapti.

La verko meritas foston kaj pludiskuton.

P.V. Ranganayakulu (Hinda Unio)

Aktualeco sub demandosigno

La turo de l' popoloj, Han Ryner. El la franca trad. Valo. Laroque Timbaut: Laŭte, 1983. 153p. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Prezo: 10,20 gld.

Mi vere ŝatus scii, ĉu la aŭtoro (mortinta en 1938) verkus sian libron ĉi tiel ankaŭ post la nazia genocido kontraŭ la judoj. Se kredi la antaŭparolon de la tradukinto, mi per tiu demando malkaŝis min kiel supraĵan leganton. Tamen juĝu mem: La aŭtoro rakontas grandiozan revon – antaŭ kelkmil jaroj la popoloj de okcidenta Azio kolektiĝas por konstrui turegon. Malsame al la babela turo de la Biblio, la popoloj jam havas malsamajn lingvojn, sed evoluigas per la komuna laboro piĝinan interlingvon. La laboristoj

bone interkompreniĝas per ĝi, tamen iliaj religiaj gvidantoj ne sukcesas ne kvereli kaj rezultigas murdojn, venĝojn kaj militon. Kulpuloj estas inter aliaj la "idoj de Sem", dum la heroo estas blonda, bluokula arĵo, kies popolo, cetere, poste elmigras al la patrujo de la aŭtoro.

La tradukinto emfazas, ke la aŭtoro tute ne estis malamanto de la judoj, sed volas ataki (kiel jam en siaj pli frue tradukitaj verkoj) la tri unudiajn religiojn, ĉar ili kaŭzis tiom da fanatikismo, kaj do ĉefe atakas la plej malnovan kaj idedonan el ili, la judan. Tio, kio okazis post la morto de la aŭtoro, tamen devigus samintencan hodiaŭan aŭtoron multe pli klare enfokusigi la kontraŭreligian, kontraŭfanatikisman, sed nepre ne kontraŭpopolan aŭ kontraŭhoman cel-direkton de tia verko.

Malgraŭ ĉi tiu unuavida impresio, la libro prezentas interesan fikcion, kiun la aŭtoro verŝajne uzante historiajn nomojn kaj faktojn. Aliflanke li, kiel jam aliaj verkantoj de historia fikcio, ne rezistis la tenton meti ĉiujn grandatingojn de la homaro en la sortoperiodon de unu homo.

La traduko estas ĝenerale bona, tamen ne malforte ĝenas la alparola pronomo "ci", kiu ne estas adekvata traduko de la supozebla franca originalo *tu*, sed kiu tute nenecese aldonas odoron de movada provinco. Mi emus scii, kial Literatura Komitato de SAT ne internaciigis tion.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Ne sufiĉas nomi emociojn

Printempa danco/Maĝĝifna tarrebbiegħa, Mario F. Bezzina (1950). El la malta trad. Carmel Mallia (1929). B'kara: Literatura Viglo, 1983. 38p. 21cm. Dulingva eldono malta kaj Esperanta. Prezo: 4,50 gld.

Promesplena broŝuro: juna aŭtoro, originaloj kaj tradukoj paralele, tradukoj lingve senriproĉaj, kompare kun simpatia sed malglata, longa poemo de Dun Karm tradukita antaŭ 10 jaroj.

Sed, strange, jen italaj pejzaĝoj anstataŭ maltaj; la "sennebulaj detaloj" de "malta folkloro festo" restas nur promeso de la enkonduko. Ekzemple "Pinĉjo" post bona komenco (*sur la senrose sekaj ŝtonetoj/dissternitaj tra ĉi ĝardeno*) finiĝas per: ... *al la ĉiel' incensovualita.../la arboj sorĉige belaj/kiel floroj salutantaj la lumon/plurfoje ĝojtremis/dum ĉi mistera mateno/de l' Sinjoro...* Kvazaŭ sufiĉas per tiaj vortoj nur nomi emocijn – kiel pri Asizo: *dum regis kvieta nostalgio/kaj harmonio/min plenigante per/la belebrio*. Plej sukcesas montri novan senton per konkretaj vortoj "Isola Maggiore": *La ĉastan kanton de mistera birdo/trapenetrantan la kvieton/.../liberaj virabeloj/suĉis la dornojn/dum du amantoj*

*interkisis/interkisadis.../apud hontemaj limakoj/
sputludante/sur la ŝtonoj...*

Tamen, mi volonte kontrolus iujn finaĵojn; jes, eble la libro plej interesos tiujn, kiuj scivolas pri la malta lingvo.

Kris Long (Britio)

Laste aperis...

Akcepti la eksterteranojn; Ili kreis la homon en laboratorio (1979), Rael. El la franca trad. J.-P. Rimbaldo. Rennes: la tradukinto, 1983. 166p. Ilus. 21cm. Prezo: 22,80 gld.

Almanako Lorenz 1984. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1983. 192p. Ilus. 21cm. Kolekto de 67 diversaŭtoraj tekstoj, prozaj kaj versaj, plejparte kun spiritisma vidpunkto. Prezo: 9,00 gld.

Elementa Esperanto-kurso, Li Weilun. Pekino: Eldonejo Scioj, 1983. 127 + 93p. 19cm. 20-leciona lernolibro laŭ gramatika metodo por ĉinlingvanoj, kun vortareto kaj tradukoj de tekstoj kaj ekzercoj por memlernantoj. Prezo: 12,00 gld.

... El la kara infaneco, Valo (pseŭdonimo). Laroque Timbaut: Laŭte!, Cercle espérantiste de l'Agenais, "Laŭte", 1983 (2a eld.). 103p. Mimeo. 21cm. Memoraĵoj de la aŭtoro de 1900 ĝis 1914. Prezo: 6,00 guldenoj.

Esperanto-kroatserba poŝvortaro (1973), Zlatko Tišljarić. Internacia Kultura Servo, 1983 (4a eld.). 65p. 17cm. 4 300 radikoj, kun korelativa tabelo kaj afiksaro. Prezo: 4,80 gld.

Esperanto leerboek (1952), C.B. Zondervan (1899-1983) kaj W.J.A. Manders (1910). Sen bibliografiaj indikoj (Nederlando): 1983 (6a eld.). 135p. 21cm. 32-leciona lernolibro kun ampleksa ekzercaro, uzebla por personoj, kiuj jam posedas ĝeneralan konon pri gramatikaj nocioj. Prezo: 16,50 gld.

Historio de la Brita Laborista Esperanto-Asocio kaj Internacio de Proleta Esperantistaro, komp. Arthur Nobes. Kolektivo de britaj socialistoj, 1984 (sen bibliografiaj detaloj). 24p. Ilus. 21cm. Traktas precipe la intermilitajn jarojn ekde 1921. Prezo: 4,50 gld.

Imperativoj de la vivo (1963), Huberto Rohden (1894-1981). El la portugala trad. D. Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1983 (2a eld.). 156p. 15cm. La filozofio de Kristo por la ĉiutaga vivo. Prezo: 6,00 gld.

Kunikloj de mia avo, La / Conigli di mio nonno, I, Giovanna Sarandrea. El la itala trad. Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Edizioni Gabrielli, 1983. 60p. Kolorilus. de C. Noce. 31cm. Dulingva eldono itala-Esperanta. Fabelserio Plejado. Biografia historio pri itala vilaĝo, kiu instruas kiel reagi al doloro kaj soleco. Prezo: 33,00 gld.

Provu en Esperanto, Giŭan Bak. Eldonloko ne indikita (Korea Resp.): la aŭtoro, 1983 (2a eld.). 109p. 16cm. Laŭtema frazaro por korelingvanoj. Prezo: 5,40 gld.

Racia kaj ateista budhismo, La. El la franca trad. T.F. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, Laŭte!, 1984. 33p. 21cm. SAT-Broŝurservo. Komparo inter la raciisma kaj ateisma manieroj rigardi la budhismon. Prezo: 2,40 gld.


Seks-edukado kaj psikoterapio: integriĝo al mensa sano, E. James Lieberman. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1983. 28p. 27cm. KT34. Prezo: 7,80 gld.

7 000 tagoj en Siberio, Karlo Štajner (1902). El la kroata trad. K. Barković. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1983. 495p. Ilus. Mapo. Aŭtobiografio de komunisto, ekzilita de Stalin al siberiaj koncentrejoj en 1936, kaj liberigita en 1956. Prezo: 54,00 gld.

Sindefendologiaj studoj 1, red. Jindřich Novák. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 94p. Ilus. 20cm. Ok fakaj prelegoj pri la sindefendo, kun abundo da desegnaĵoj pri la movoj. Prezo: 7,20 gld.

Suplementaro de Fundamenta Leksikono Esperanta; Parto 2; Fundamentaj materialoj kaj primitivaj demandoj, Masao Hukata (1912). Tokio: Asake-Syoboo, 1983. 163p. Ilus. 25cm. Mikspoto pri diversaj lingvaj kaj aliaj demandoj (alfabetoj, numeraloj), ofte kun interesaj komparoj de pluraj lingvoj. Prezo: 15,90 guldenoj.

Suplementaro de Fundamenta Leksikono Esperanta, Masao Hukata (1912). Tokio: Asake-Syoboo, 1983. 744p. Ilus. Mapoj. 25cm. Kunbindaĵo de *Mallongigoj, tabeloj, listo k.a., Tajpada terminaro, Fundamentaj materialoj kaj Propraj nomoj*. Ĉio kun plurlingvaj komparoj. Prezo: 69,00 gld.



Sur la bordo (1957), Nevil Shute (N.S. Norway, 1899-1960). El la angla trad. K.G. Linton (1906). Sydney: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1983. 254p. 21cm. ISBN 0 9595336 3 X. La plej konata romano de sukcesplena verkisto, pri la minaco de nukleaj armiloj. Prezo: 27,00 gld.

Vostokonkurso, Wang Zhenhua. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 14p. Kolorilus. de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. 21cm. 88-Es-200P. Fableto pri la utilo de individua diverseco. Prezo: 1,80 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5 %, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19 % por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Loke

● **Belgio:** En Xhoris, en la franclingva parto de la lando, oni organizos internacian renkontiĝon por komencantoj la 28an kaj 29an de aprilo 1984. Escepte de du klerigaj prelegoj, la karaktero de la aranĝo estos ĉefe distra. Informojn donas Freddy Bosmans, Route du Comblain 21, B-4183 Ferrières, Belgio.

● **Ĉilio:** La relative juna Ĉilia Esperanto-Asocio (aliĝinta al UEA en 1979) disponas ekde aŭgusto 1983 pri taŭga sidejo ĉe Ĉilia Instituto pri Hispana Kulturo, en Santiago. La direktorino de la Instituto, A. Goyenechea, ne nur gastigas la esperantistojn sed ofertis ankaŭ ĉiuspecan helpon por la ambicia agadprogramo de ĈEA: Jam okazis unusemajna ekspozicio pri la Internacia Lingvo, inaŭgurita per prelego de prof. A. Toloza. Post tiu aranĝo la UEA-delegito en Santiago, Iván Mättig, povis arigi 20 partoprenantojn por sia Esperanto-kurso laŭ Ĉe-metodo. Plia paŝo antaŭen estis la fondo de ĈEA-filio en Valdivia en la suda parto de la lando. La membroj rekrutiĝas el la tiea universitato kaj la studentoj urĝe bezonas taŭgajn Esperanto-librojn por la necesa biblioteko. Adreso: Valdivia Esperanto-Societo, Los Tenos 101, Isla Teja, Valdivia, Ĉilio.

● **Soveta Unio:** Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE) entreprenis ampleksan laboron, kies celo estas ordigi kelkajn demandojn pri la instruado de Esperanto en Soveta Unio. La estraro de ASE ĵus aprobis kvar tiurilatajn dokumentojn: regularo pri atestado (ekzamenoj), konsisto de la ekzamena komisiono de ASE, programo de elementa Esperanto-kurso, programo de ekzameno pri instrukapablo.

Fake

● **Instruado:** La kleriga ministerio de Estona SSR okazigas ĉiun duan jaron lingvajn konkursojn por lernantoj de fremdaj lingvoj. La unuan fojon ĉi-jare en januaro konkursis apud la lernantoj de la angla, germana kaj franca ankaŭ lernantoj de Esperanto. En la malferma soleno membro de la Pedagogia Akademio de Soveta Unio, prof. Heino Lii-meta, substrekis la gravecon de la instruado de Esperanto, kiu estis ankaŭ lia unua fremdlingvo, ellernita antaŭ pli ol 40 jaroj. La gajnintoj de la konkurso ricevis Esperanto-librojn kaj medalojn kun la reliefo de Zamenhof.

● **Interlingvistiko:** Ĉe la Eldonejo por Popularscienca Literaturo, Leipzig (Germana DR), antaŭ nelonge aperis monografio pri la vivo kaj verko de Wilhelm Ostwald (1853-1932), la nobelpremiito pri kemio en 1909. Unu ĉapitro traktas la pledadon de Ostwald por Esperanto kiel internacia lingvo de scienco komence de la jarcento, kaj ankaŭ lian sensukcesan provon antaŭenpuŝi Idon post la skismo en 1907.

● **Komputado:** Christian Bertin, aŭtoro de pluraj prikomputadaj verkoj en Esperanto kaj de *Angla-Esperanta telekomunika vortaro*, proponas eldoni serion de kajeroj pri aktuala komputiko. Li petas kompetentajn, 5- ĝis 15-paĝajn artikolojn, nete tajpitajn, por fotoreprodukto en la formato A4. Temas do pri ia "skriba simpozio", kiun Bertin sukcese uzis jam en 1981, kiam sammaniere pretiĝis la 268-paĝa volumo *Unua simpozio pri komputiko* (33,00 gld. ĉe la Libro-servo de UEA). Pri la aliaj teknikaj detaloj de la nova projekto bonvolu skribi al: Inĝ. C. Bertin, CCETT AIS, Rue du Clos Courtel, B.P. 59, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio.

● **Esperantologio:** En la laste aperinta numero de *Language Problems and Language Planning*, n-ro 3/1983, lingvistika revuo subvenciata de CED, aperas anglalingva artikolo de W.A. Verloren van Themaat kun Esperanta resumo,



● **Greklando:** En sia nova, vasta ejo, la 16an de decembro Helena Esperanto-Asocio festis ne nur la Zamenhofan Tagon, sed ankaŭ la 75-jaran jubileon de UEA, kiu fondiĝis en 1908. Prelegis la ĝenerala sekretario s-ro Kostas Kiriakos (dekstre), pri la temo "La Internacia Lingvo Esperanto kiel esprimo de lingva egaleco kaj libereco". La festan programon partoprenis ankaŭ parto de la asocia koruso, kiu prezentis plurajn konatajn meolodiojn en Esperanto. Poste sekvis koktel-vespero por ĉiuj 150 ĉeestantoj de la solenaĵo.

”Kreivo kaj konscia reflektado en la uzado de la denaska kaj nedenaskaj lingvoj”. Li aldonas ekzemplojn el la Esperanta beletro kaj el la lingvouzo de ”simplaj” esperantistoj. La kajero entenas ankaŭ kvinpaĝan itallingvan recenzon de Tazio Carlevaro pri *Miscellanea interlinguistica* (1980), komp. de István Szerdahelyi, kaj diverslingvajn notojn pri lingvoproblemoj en kvar kontinentoj. La revuo estas abonebla ĉe UEA (45,00 gld. por unuopuloj; 72,00 gld. por institucioj).

● **Radio:** Laŭ la regula jara statistiko de Georges Larglantier, okazis rimarkinda kresko en la nombro de elsenditaj programoj en Esperanto. En 1983 dek unu stacioj en dek landoj disaŭdigis 4 220 programojn, kiuj daŭris 1 821,5 horojn, dum en 1982 oni elsendis dum 1 555 horoj (1 497 horoj en 1981). La plej multajn elsendojn dum 1983 havis Radio Pollando (1 998 programojn dum 893,33 horoj, kompare kun 630,45 horoj en 1982), kiu preterpasis Radion Pekino (1 460 programoj dum 730 horoj, kiel en la antaŭa jaro). Sekvas kiel antaŭe Rádio Berno kun 312 programoj dum 52 horoj, Radio Vatikano restas ĉe 104 programoj, dum Radio Vieno elsendas same ofte.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Anoj de Naturisma Klubo Esperantista serĉas kontaktojn kun naturismaj esperantistoj en la tuta mondo: P.T.N. – Esperanta Naturisma Klubo, Wisnowa 24/5, PL-65-517 Zielona Góra, Pollando.

Tutmonde 1984-a. Monata informilo pri nia milito kontraŭ milito. Jara abonprezo 6 respondkuponoj. Provezemplero kontraŭ unu respondkupono. Mendu ĉe: Apartat 313, Terrassa, Hispanio. Urbdelegitoj bezonataj.

Almanako Lorenz 1984 – Varia enhavo: filozofio, scienco, religio; transmondo, ĉi-mondo. Prezo: 10 rpk. Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, Rio de Janeiro, Brazilo.

BERNARD M. CAVANAGH (1899-1983) forpasis la 26an de decembro en Hispanio. Li eklernis Esperanton en 1960 post sia emeritiĝo el kariero kiel lekciisto pri fizika kemio en la universitatoj de Manĉestro kaj Melburno. De 1966 li dum pluraj jaroj estis la prezidanto de Brita Esperanto-Asocio. Li krome tenis la postenon de Esperanto-lekciisto en la Universitato de Liverpool. Inter liaj verkoj troviĝas *Elektrolitoj*, eldonita de Someraj Universitataj Kursoj en 1974.

K. GOOS el Enkhuizen, Nederlando, mortis la 29an de decembro. Li estis membro de UEA de 1951.

IMRE FERENCZY (1894-1983) forpasis la 26an de novembro en Gyöngyös, Hungario, kie li dum multaj jaroj servis kiel delegito kaj fakdelegito de UEA. Li lernis Esperanton jam en 1911 kaj tra ĉiuj postaj jardekoj aktivis por la Internacia Lingvo.

JEAN-ROGER LÉGER (1894-1983), kolonel-leŭtenanto, mortis la 4an de septembro en Verteillac, Francio. Li

estis konata en la Movado kiel leksikologo. Lia unua verko estis *Lexique fondamental espéranto-français* (1957). Poste li, kunlabore kun A. Albault, kompilis la ampleksan kaj ankaŭ nun la plej aktualan francan-Esperantan vortaron – *Dictionnaire français-espéranto*, kiu aperis en 1961.

KARL-HEINZ MISCHLER, iama prezidanto de Svisa Esperanto-Societo kaj dumviva membro de UEA, mortis fine de 1983 en Zuriko, Svislando.

NGUYỄN PHUỐC TRACH (1913-1983), lingvoinstruisto, mortis la 19an de septembro en la urbo Ho Chi Minh, Vjetnamio. Li aktive estris la lokan Esperanto-grupon de 1966 ĝis 1974.

JOHANNE KIRSTEIN NIELSEN (1924-1983) mortis la 11an de novembro en Lemvig, Danlando. Lerninte Esperanton en 1956, ŝi multe aktivis por la Movado. Ŝi funkciis i.a. kiel la fakdelegito pri turismo.

ZORA MLADENOVA-HANS (1895-1983) mortis en Varna, Bulgario. Ŝi estis fakdelegito pri edukado.

DIRCEU PORCIÚNCUA (1906-1983) mortis en Rio Grande, Brazilo, kie li funkciis kiel la delegito.

J. SCHALTEGGER (1901-1983) el Steffisburg, Svislando, mortis antaŭ nelonge. Li estis dumviva membro de UEA.

GUSTAV SCHOLZE (1889-1983), inĝeniero, mortis en Munkeno, FR Germanio. Origine lerninte Volapukon, li transiris al Esperanto kaj persone konatiĝis kun Zamenhof. Li reorganizis la tiaman ”Germanan Esperanto-Ligon en Ĉeĥoslovakio” kaj estis ĝia prezidanto de 1932 ĝis 1938, ankaŭ redaktante ĝian informilon. Li funkciis kiel komitatano de UEA. En 1925 li partoprenis la du konferencojn pri Esperanto en la scienco kaj komerco en Parizo. Scholze instruis Esperanton en la Germana Supera Industria Lernejo en Reichenberg (nun Liberec), enkondukis Esperanton ĉe la loka komerca foiro kaj kunlaboris je teknika fakvortaro. Li poste aktivis ankaŭ en Munkeno.

KARL SCHULZE (1910-1983) mortis la 2an de julio en Berlino, Germana DR. Li estis aktiva sur la loka kaj nacia nive-

Anoncetoj

Vizitu la urbon Malmö. Petu grandan belegan multkoloran broŝuron pri Malmö en Esperanto. Senkoste. Menciuj la vorton Esperanto. Skribu al Malmö Turistbyrå, Hamngatan 1, S-21122 Malmö, Svedio. Antaŭ vizito laŭeble informu la UEA-delegiton.

17-jara studentino serĉas multlandajn kontaktojn. Marcela Hamráková, okr. Sp. Nová Ves, CS-05351 Klvknava 270, Ĉeĥoslovakio.

Se vi apartenas al la kategorio de ”blindaj ŝafoj” (laŭ citaĵo de d-ro Zamenhof, en PIV pĝ 1055), legu la sukcesan aktualan broŝuron 64-paĝan de Ligue Française ”Pro Unesco”, 24 ave. Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Prezo (afrankite): 28 francaj frankoj aŭ ok poŝtaj kuponoj. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

loj kaj kunlaboris por la gazetoj *Der Esperantist* kaj *Paco*, sed li estis internacie konata per siaj gravaj tradukoj el la germana. En 1974 aperis lia traduko de *Nuda inter lupoj* de Bruno Apitz, kiu furore vendiĝis. Li tradukis ankaŭ *Tri-groŝa romano* de Bertolt Brecht, kiu

aperis en 1977, sed ankoraŭ ne eldonita restas lia traduko de ambaŭ partoj de *Faŭsto*, kiel ankaŭ aliaj verkoj de Brecht kaj Thomas Mann.

VÁCLAV SVÁTEK (1917-1983) mortis en Prago, Ĉeĥoslovakio, kie li estis fakdelegito pri veterinaraj aferoj.

garet L. Barkley; Moshe Lewin; Douglas B. Swett; William West Glenny; William R. Harmon; William H. Schulze.

DONACOJ 1984 (Gld.)

ĝis la 9-a de februaro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Anonime 2 000,00; anonime 500,00. Japanio: Nabuo Sakurai 200,00. Nederlando: B. Muizelaar 100,00; A.J. Middelkoop 50,00. Sumo ĉi-jara 2 850,00.

FONDAĴO CANUTO: Anonime 1 000,00. Nederlando: A.J. Middelkoop 50,00. Sumo ĉi-jara 1 050,00.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: M. Gründler 39,37; I. Pahnhenrich 12,37; Esp.-Grupo Nürnberg 33,75; A. Knebusch 39,49. Nederlando: A.W. Treurniet 20,00. Svedio: Ulla Luin 100,00. Diversaj malgrandaj 11,24. Sumo ĉi-jara 256,22.

JUBILEA JARO: Anonime: 100,00. Sumo ĉi-jara 100,00.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: R. Paintner-Trumpp 449,96. Sumo ĉi-jara 449,96.

NOVJORKA OFICEJO 1983

PATRONOJ (minimumo \$100): Usono: Daniel N. Maxwell; Hiram E. Reed. SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: D.R. Munday; Jean A. Lehane. Finnlando: Terttu Österman. Usono: Horace B. Hand; Ken Thomson. AMIKOJ (minimumo \$10): Francio: A. Eyssautier.

NOVJORKA OFICEJO 1984

PATRONOJ (minimumo \$100): Finnlando: Tapio Sormunen. FR Germanio: Heinrich Nischwitz; Ruth Paintner-Trumpp. Francio: Renée Volpelière. Japanio: Nobuo Sakurai. Usono: Wiram Elwin Reed; Jaqueline T. Reynolds; Mary Murray. SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Alĝerio: Mirian Dobrzyński. Belgio: Maurice Borguet; Stella De Weerd. FR Germanio: Wolfgang Schwanzer. Francio: René Lemaire; Maximilien Trenner. Hispanio: María Pi Maynar. Japanio: Isamu Yamaga. Kanado: P. Larose. Nederlando: Ingeborg M.J. Dijkhoff-Lenze; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; Jenny Heetkamp-Sensius. Usono: Horace Bryce Hand; Ken Thomson. AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: John B. Moore;

Oficiala Informilo

ĈEFDELEGITO EN IRANO

Por ligi pli proksime la novan Movadon en Irano al nia Asocio, la Estraro de UEA ĵus nomis, unuafoje, ĉefdelegiton por tiu lando. Temas pri s-ro Ahmad Reza Mamduhi, 120 Kh. Golnaz Shalmali, Sadegie (Arya-shahr), Tehran 14-516. La rezulto de lia agado videblos jam en la venonta Jarlibro, kiu montros, ke ampleksiĝas la delegita reto en Irano. La membroj de UEA en tiu lando, kiuj deziras (kaj rajtas) fariĝi UEA-delegitoj, bonvolu ekde nun turni sin al s-ro Mamduhi.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aŭstrio: Sieglinde Stamm.

SOCIETO ZAMENHOF 1983

Kanado: Marta Evans.

SOCIETO ZAMENHOF 1984

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Aŭstralio: Tim A. Einihovici; L.V. Scott; Margaret Mary Chaldecott; Ilija Grahovac (forpasinta); Ralph Harry. Belgio: Elfriede Ernst. Brazilo: Elvira Fontes; Francisco de Souza Almada; Marija Pozder Almada; Álvaro Rabêlo. Britio: Ian Jackson; John Brownlee; Wilfrid G. Atkinson. Danlando: P.O.P. Andersen. Finnlando: Aarne Ratalahti; Harri Tuomola; Vuokko Tellervo Heinäsuo. FR Germanio: Harry Bily; Ellen Eggers;

Martin Gründler; Helene Hiebel; Hans Schütt; Julie Winter. Francio: Eija-Liisa Chevalier; Gaston Waringhien; Henri Dabezies; Odette Bernet. Italio: Clara Gubbioli Carioli; Medardo Biagi; Michele Mariano. Japanio: Isamu Yamaga; Koiĉi Ŝimizu; Syozi Hosonuma; Toyozo Nisikawa. Jugoslavio: Petar Fjodorov; Jožica Židanik. Kanado: Dorothy M. Hawley; Edward William Woodruff; Betty Salt; Wilfred Settle. Luksemburgo: Brian R. Moon. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: Evert J. Woessink; Elly Kervers-van Tholen; Gerard Peet; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; John Rapley; Louise Adelaar; H.C. Luijke; Truus Mantingh; Elsa S. Otto; S.A.K. van der Zee; Akiko Ŭusink-Nagata; W.A. Verloren van Themaat; W. Rodenhuis; Gerda H.M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Agnete Anjer; Ludvig Anjer; Margrete Landmark; Olaf Maeland. Nov-Zelando: D.J. Langman. Svedio: Maja Ahlström; Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Bror Lindström; Edla Nilsson; Gustav Nygård; Karl E. Gustafsson; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Leif Holmlund; Martha Colliander; Ragnar Hjorth; Sten Svenonius; Tore Johansson; William Malmstem. Usono: Bruce Arne Sherwood; Charles W. Tustin; Ĝiĝi Harabaĝiu; Gertrude Novak; Mar-

Reklami Esperanton kaj la Kongreson!

Aperis bela dukolora (verdo kaj ruĝo) glumarko pri la 69a UK en Vankuvero. Ĝi estas ronda (diametro: 37 mm), memglua, kun amaso da lerte plektitaj detaloj: verda stelo, acerfolio (simbolo de Kanado), mondmapo, kongresaj nomo kaj dato. Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): 11,40 (por Nederlando 13,56) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



La membraro de UEA en 1983

Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo
Albanio	—	1	1	Kamerunio	—	1	1	Sud-Jemeno	—	1	1
Alĝerio	—	1	1	Kanado	137	91	228	Svazilando	—	2	2
Andoro	—	1	1	Kenjo	—	1	1	Svedio	1001	419	1420
Angolo	—	1	1	Kolombio	?	26	26	Svislando	230	170	400
Argentino	325	73	398	Kongo	—	2	2	Tajlando	—	3	3
Aŭstralio	124	111	235	Korea Resp.	421	46	467	Tunizio	—	2	2
Aŭstrio	272	63	335	Kostariko	—	2	2	Turkio	—	2	2
Bangladeŝo	—	1	1	Kubo	—	21	21	Urugvajo	—	4	4
Belgio	893	245	1138	Kuvajto	—	1	1	Usono	273	400	673
Bermudo	—	1	1	Libano	—	1	1	Venezuelo	14	19	33
Bolivio	—	1	1	Luksemburgo	93	6	99	Vjetnamio	—	6	6
Brazilo	507	356	863	Madagaskaro	—	1	1	Zairio	19	9	28
Britio	948	381	1329	Malajzio	—	2	2	98 landoj	31062	6439	37501
Bulgario	5110	98	5208	Malto	70	1	71	LA ŬKATEGORIA RESUMO			
Ĉeĥoslovakio	2372	103	2475	Maroko	—	3	3	DE LA MEMBROSTATISTIKO			
Ĉilio	45	12	57	Meksikio	35	20	55	DE UEA POR 1982 KAJ 1983			
Ĉinio	1120	36	1156	Mongolio	—	3	3	Kategorio	1982	1983	
Danlando	270	108	378	Namibio	—	1	1	Membro-Jarlibro	1115	1054	
Ebura Bordo	—	3	3	Nederlando	401	445	846	Membro-Abonanto	4015	3962	
Egiptio	—	2	2	Nepalo	—	2	2	Dumviva Membro	995	995	
Ekvadoro	—	1	1	Nigerio	—	2	2	Honora Membro	22	24	
Finnlando	525	234	759	Nikaragvo	—	3	3	Juna M-Jarlibro	181	189	
Francio	510	593	1103	Norvegio	335	104	439	Juna M-Abonanto	228	215	
FR Germanio	1032	479	1511	Nov-Zelando	89	69	158	Individuaj Membroj	6556	6439	
Gambio	—	1	1	Pakistano	—	5	5	Aligitaj Membroj	21543	22265	
Germana DR	500	31	531	Panamo	—	1	1	Junaj Al. Membroj	8525	8797	
Greklando	388	28	416	Peruo	15	6	21	Membroj entute	36624	37501	
Gvatemalo	—	1	1	Pollando	5100	71	5171	Societo Zamenhof	197	182	
Haitio	—	1	1	Portoriko	—	1	1	Abonoj <i>Esperanto</i>	298	264	
Hinda Unio	—	16	16	Portugalio	304	31	335	Kolektivaj ab. <i>Eo</i>	1270	960	
Hispanio	433	178	611	Reunio	—	1	1	Abonoj <i>Kontakto</i>	231	429	
Hongkongo	—	5	5	Rumanio	—	29	29	Kolektivaj ab. <i>Kto</i>	137	400	
Hungario	3094	157	3251	Ruando	—	1	1	Patronoj TEJO	59	82	
Indonezio	—	4	4	Salvadoro	—	1	1	Kotizoj entute	38816	39818	
Irano	—	56	56	Sanmarino	—	1	1	Nota: Temas nur pri la pagitaj kotizoj.			
Irlando	50	9	59	Saud-Arabio	—	1	1	Mankas informoj (kaj pago) pri la ali-			
Islando	14	36	50	Senegalio	—	1	1	gitaj membroj en Kolombio.			
Israelo	244	79	323	Singapuro	—	1	1				
Italio	1421	243	1664	Sirio	—	1	1				
Jamaiko	—	1	1	Soveta Unio	—	70	70				
Japanio	1089	370	1459	Srilanko	—	3	3				
Jordanio	—	1	1	Sud-Afriko	39	26	65				
Jugoslavio	1200	174	1374	Sudano	—	1	1				

T. Elliott. Belgio: J. Thibé. Finnlando: Hemmo Tietti; Arvo E. Korpela; Veera Tietti. FR Germanio: Herbert Busch; Richard Wluka. Francio: Olga Eyssautier. Nov-Zelando: S.H. Dodds; Jeannie Wilson. Usono: M. kaj H. Leonard; Manda Tata; Pearl Wegher.

PATRONOJ DE TEJO 1983

Aŭstrio: Mag. Karl Hirmann. Usono: Lyle Evans.

PATRONOJ DE TEJO 1984

Argentino: Luis Dimas Arroyo; Rodolfo G. Calógero. Aŭstralio: Gerald S. Tumman. Belgio: Stella De Weerd. Britio: E.E. Mallett; Patricia C. Sinclair. FR Germanio: Günther Becker; Didier Izacard; Uwe Joachim Moritz. Hispanio: Ada Fighiera-Sikorska; María Pi Maynar; Juan Azcuénaga Vierna. Japanio: Bun'iti Isizaki; Zyun'iti Sibayama; Katuya Sumiyosi; Koiči Ŝimizu; Yosiki Tatumi. Jugoslavio: Peter Zlatnar. Ne-

derlandio: Conny Ch. M. Tan; F.J. Pieterse-Kruger; Ineke Emmelkamp; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; Jenny Heetkamp-Senstius; J.S. Douma; J. Soeteman; Louise Adelaar; Willem P. Roelofs; Rob Vetter; Henk M. Schippers; W.L. van Leeuwen. Norvegio: Ludvig Anjer; Margrete Landmark. Nov-Zelando: D.J. Langman; Frank E. Swift; Jeannie Wilson.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 41.01m (7315 kHz), 30.36m (9880 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 19.78m (15165 kHz), 16.91m (17745 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.45-09.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz).

20.00-20.10 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700

kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 86.5 MHz. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

22.00-22.15 Rio-de-Janeiro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz).

MARDE

05.40-06.00 KELI, Sveda Sekcio, 25.35m (11835 kHz). (Nur la unuan mardon de ĉiu monato, per ondoj el Kito, Ekvadoro). Radio HCJB, Box 110, S-542 01 Mariestad, Svedio.

21.10-21.30 KELI, Sveda Sekcio, 16.86m (17790 kHz). Kiel ĉi-supre.

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz).



18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

SABATE

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 7315 kaj 9880 kHz al Japanio kaj Koreo; 15165 kaj 17745 kHz al Sudorienta Azio; 7470, 9365 kaj 9965 kHz al Eŭropo; 9860 kaj 11575 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko je la 20.00 h. **Vieno**: 5945 kaj 9770 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno**, **KELI-Radio**, **Romo**, **Varsovio**, **Vatikano**, **Vieno**, **Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio-de-Janeiro**, **Sorocaba** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

Ne sufiĉas nur aŭskulti!

Esperantaj radioelsendoj estas (aŭ povus esti) la plej regula kontakto kun la parola lingvo por la plimulto de esperantistoj. Vi ja scias, ke pasintjare okazis 4 220 tiaj elsendoj, kiuj daŭris 1 822 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum preskaŭ 5 horoj. Provu foje! Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu ankaŭ, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco ĉe la aŭskultantoj. Pro tio:

Skribu foje al radio-stacio!

Eldonejo - librejo SONORILO

- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj,** kun surprisitaĵoj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakajoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo, El popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Monato, Norvega esperantisto, Oomoto.* Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5 %, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

**Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22,
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)
Belgio. ☎ (03) 827 24 05.**

Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!

Neniu devigas vin aboni kultureman, politikan, skandaleman, ajnistan revuon!

**Tia LA KANCERKUNIKO
estas:**

Abono 55 F.F. P&K. 12 729 73 X Paris, je la nomo de Le Puil – Aŭ ĉe UEA por konto klik-g. Provekzemplero kontraŭ 3 IRK.

Kial tiom da Esperanto-revuoj estas presataj en Antverpeno?

Respondo:

- En Grafika Centro Antverpeno laboras esperantlingvaj kompostistoj (do malpli da eraroj).
- Presas ĉion movada entrepreno (do via mono restas interne de la Esperanto-movado).
- La poŝttarifoj por revuoj estas en Belgio eksterordinare malaltaj.

Petu pli da klarigoj de:

**Grafika Centro de UEA, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen.**

Jen postmorte la vivoverko de la iama vicprezidanto de la Akademio, elstara esperantologo.

Inter la temoj, kiujn traktas ĉi tiu kolekto de esperantologiaj eseoj troviĝas ankaŭ la jenaj:

- Fonetiko; Vortfarado; Prepozicioj
- Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto
- La arto traduki; Propraj nomoj
- La elementoj de Esperanto, ĉu arbitre elpensitaj?
- Onomatopeoj en Esperanto.

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendokostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

ATANAS D. ATANASOV

LA LINGVA ESENCO DE ESPERANTO

UEA, ROTTERDAM, 1983

POR RENESANCA PERIODO DE ESPERANTO

Ĉu iu MECENATO, asocio, fondaĵo aŭ eldonisto publikigus la precizajn, nepre necesajn regulojn pri refleksivo kaj komparacio, la plej malfacilaj kaj nekona-taj partoj de Esperanto, por ke tiu ĉi scienca eltrovo ne perdiĝu en mezepoka mallumo de indiferenteco aŭ mal-bonvoleco?

Interesatojn informos L. Mimó,
str. J. Comas, 19. SABADELL, HISPANUJO.

ATENTU!

Distribuanto de EPCĉ ŝanĝis sian nomon!

La Esperanta Sekcio de CENTRO DE
ĈINAJ ELDONAĴOJ (GUOJI SHUDIAN)
jam en la pasinta decembro ŝanĝis sian
nomon.

Nun ĝi nomiĝas:

Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) Esperanta Sekcio

kaj ĝia adreso
daŭre estas : P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

1930: Ĉu la novlanĉitajn aŭto-motor-revuojn abonas nur
la profesiaj ŝoforoj?

1984: Ĉu la nova, kvaronjara, 64-paĝa, kolorkovrila revuo

Internacia komputado informas nur komputistojn?

NE! Ĝi estas magazino por ĉiu progreseculo,
ankaŭ por vi!

Kotizperantoj jam en 28 landoj! Ĉe UEA jarabono 24, provek-
zemplero 7,50 gld. Pri enlandaj aboneblecoj senpage informas:
Komputista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.
TUTJARA ABONKAMPANJO POR 1984

KANADO

vokas vin al la UK.

Poste, kial ne partopreni en la
postkongresa ekskurso
(29 julio-11 aŭg.)

kiu kondukos vin al Kalifornio kaj najbaraj regionoj?

Estas inkluzivitaj:

- flugo de Vankuvero al San-Francisko
- 13 noktoj en hoteloj kun privataj banĉambroj, klima-
tizo, televidilo
- esperantista ĉiĉeronado
- vizitoj al lokaj esperantistoj

Provizora prezo: \$US 1175 Deponsumo: \$US 200

Petu nian luksan broŝuron!

Bankkonto: 25.52.89.804 ĉe Bank Mees & Hope, Rotterdam
Poŝta ĝirkonto de la banko estas pĉk (nederlanda) 6400
(indiku nian bankkonto-numeron sur via pagilo kiel celon)

ESPERANTO-VOJAĜOSERVO DE ELNA

kaj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando,
invitas vin veni al

USONO



Malkovru la du duonojn de la nova kontakto

Unu duono havas nekomplikan lingvaĵon, facilan kaj
taŭgan por novaj esperantistoj. Du duonoj havas stimu-
lan enhavon – interesajn artikolojn el la tuta mondo,
kiujn verkas plejparte gejunuloj, pri aktualaj temoj:
ekzemple en 1984: Religio, Kooperativoj, Homo kaj
maŝino, Krime kaj Esplorado.

Membroj de UEA/TEJO malpli ol 26-jaraj kaj Patronoj
de TEJO ricevas la revuon *Kontakto* sen plia pago. Aliaj
povas aboni ĝin. Membreco aŭ abono nun ĉe la kotizpe-
rantoj de UEA! Petu senpagan specimenon de ili aŭ de
la Centra Oficejo.

Kontakto estas abunde ilustrita, en dukolora preso. Ĝi
aperas ses-foje jare: jen dek du duonoj kiujn vi nepre
malkovru!